revuo

esperanto

septembro 1966

59-a jaro

n-ro 730 (9)

(universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

51-a universala kongreso

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

Raportoj pri la 51-a U.K.:

141 Ĉefartikolo

142 La Solena Inaŭguro
Festparolado de prof. d-ro Ivo Lapenna

145 Estraraj decidoj

146 Komitataj kunsidoj

147 La Ĝeneralaj Kunvenoj

148 Konkursoj kaj premioj

149 Teatraĵoj

151 Aliaj aranĝoj de la Arta Festivalo

152 Internacia Somera Universitato

153 En kaj ekster la programo

154 La Solena Fermo
Rezolucioj

156 ĊED: Esperanto en la lernejoj 1965-6
Katedroj kaj lektoratoj de Esperanto

158 Esperanto en radio
Nekrologoj Iranzo, Micard, Jörgensen, Kaminska
Ricevitaj eldonaĵoj

159 La Internaciaj Konkursoj 1966
Oficiala informilo n-ro 393

160 Anoncetoj

kovrila bildo La prezidanto de UEA malfermas la 51-an U.K. en Budapest, 31-an de julio 1966. Maldekstre: la Alta Protektanto s-ro Ödön Kisházi.

bildoĵn liveris **148** (sube) Torben Kehlet

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
septembro 1966

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1966): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:
0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

La Solena Inaŭguro: rigardo al la podio dum la alparolo de la Alta Protektanto

La dua plej granda

Granda. Jen la unua adjektivo, kiu saltas en la kapon, se oni rememoras la 51-an Universalan Kongreson de Esperanto en Budapest. Per kiu ajn kriterio, kongreson de 4010 aliĝintoj (la dua plej granda nombro en la historio de la lingvo) oni devas nomi granda. Kaj la grandeco jam sufiĉis, por ke ĝi impone komprenigu al la ekstera publiko la vastan socian bazon de la Internacia Lingvo. Ĉar ne temis nur pri loke orient-eŭropa fenomeno, sed venis kongresanoj plurdekope el Japanujo, el Usono, el ĉiuj anguloj de Soveta Unio....

Kiel kongresa urbo Budapest kun siaj larĝaj bulvardoj, danuba panoramo kaj antikv-etosa arĥitekturo montriĝis tre afabla gastiganto. Ankaŭ la kongresejo mem — granda sindikata konferencejo — plenumis bone sian funkcion, malgraŭ la inundo de okupantoj.

Tri aspektoj de la programo

La ĉefaj laboraj temoj de la Kongreso rilatis al la rezultoj de la Jaro de Internacia Kunlaboro, en ligo kun la lerneja instruado de Esperanto, kaj la pliintensigo de agado en fakaj medioj. Pri la tiutemaj rezultoj oni legu sur aliaj paĝoj en la raportoj pri laborkunvenoj. Trian aspekton donis al la 51-a la enprogramigo de la Tria Internacia Arta Festivalo (p. 148-52). Ĝia riĉa enhavo plue levis la kulturan nivelon de la Universalaj Kongresoj kaj la prestiĝon de la Internacia Lingvo.

Tiu prestiĝodona efiko estus kompreneble nula, se ne kunlaborus la informaj medioj. Dank'al rekta raportado fare de la Kongresa Gazetara Servo, senescepte ĉiuj hungaraj gazetoj skribis aŭ skribadis pri la U.K. Krome elsendis ĉiutage Radio Budapest en Esperanto kaj en diversaj naciaj lingvoj pri la kongresaj okazaĵoj. Tiel la tuja diskonigo enlande kaj eksterlande estis certigita.

Omaĝo al la Budapeŝta skolo

La nomo Budapest delonge portas por Esperanto tute apartan signifon. Ĝi ja estas la centro de tiu literatura skolo, kiu post Zamenhof kaj Grabowski plej multon kontribuis al la maturiĝo de Esperanto. Nature, ke la Kongreso omaĝis ilin, ankoraŭ senlace donantajn el sia genio. Ĉar, iasence, estis ilia la Kongreso. Pro iliaj strebadoj la urbo de la 51-a Universala Kongreso fariĝis, kaj restas, nabo de la internacilingva kulturo.

SALUTOJ AL LA KVINDEK-UNUA

Impone efikas — multe pli, ol fotografaĵoj povas sentigi — la amasa ĉeesto de kvar mil personoj en unu salono, eĉ kiam tiu salono ne estas eminente taŭga por solena kunveno. La pavilono Petöfi de la Foiro de Budapest, la sola konstruaĵo de la urbo, kiu kapablas enteni tian kongresanaron, pleniĝis ĝismure dimanĉmatene, la 31-an de julio, por la Solena Inaŭguro.

Tuj post la malferma deklaro de la prezidanto de UEA eksonis "Kongresa marŝo", ludita de unu el la plej elstaraj simfoniaj orkestroj de Hungarujo. La patosaj tonoj kreis konvenan etoson por la sekvonta vico da registaraj kaj aliaj salutantoj.

Salutis la Alta Protektanto

Tuj post bonvenigaj vortoj de la prezidanto leviĝis la Alta Protektanto, s-ro Ödön Kisházi, vic-prezidanto de la Respubliko. En voĉlegita parolado, kiun li finis per du tri frazoj en Esperanto, la vic-prezidanto deklaris, ke Hungarujo komencas rekoni la valoron de Esperanto, kaj esperis, ke la nombro de esperantistoj kaj aliaj pozitivaj fortoj en la mondo plu kreskos.

Bonvenigis al Budapest s-ro István Sarlós, prezidanto de la Ĉefurba Konsilantaro, kaj s-ro Béla Berceli, prezidanto de LKK.

Siajn salutojn poste aldonis reprezentantoj de registaroj: la aŭstra (aferŝarĝito), belga (s-ro Jaumotte nome de la ambasadoro kaj ministro pri edukado, kiu lasta subskribis la Proponon al UN), bulgara, orient-germana (la ambasadoro), israela (nome de la ministro pri eksteraj aferoj), norvega, nov-zelanda, sveda. Ĉeestis, sed ne salutis, ankaŭ reprezentantoj de aliaj ŝtatoj. Fine salutis ankaŭ la Unuiĝo Internacia de Pedagogoj (7 milionoj da membroj).

Post muzika paŭzo kaj saluto de la Infana Kongreseto viciĝis reprezentantoj de landaj asocioj aliĝintaj al UEA: Aŭstralio, Aŭstrujo (s-ro H. Kraus legas personan mesaĝon de Franz Jonas), Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Grekujo, Hispanujo (invito al Madrid por 1968), Hungarujo (longa stara aplaŭdo por Julio Baghy: "Tre verŝajne la lastan fojon mi staras antaŭ vi"), Israelo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Svedujo, Svislando, Urugvajo, Usono. Ilin sekvis la nealiĝintaj: ĉeĥoslovaka, orient-germana, hinda, rumana, venezuela. Fine la landoj sen organizita movado: Irlando, Malio (ankaŭ nome de afrikaj studentoj en Parizo), Sovetunio.

Per tiu internacia parado de salutantoj la programo atingis sian kulminon: la festparoladon de la prezidanto. Ĉi-sekve ni donas koncizigitan tekston laŭ la proksimuma transskribo de la Kongresa Gazetara Servo.

FESTPAROLADO DE PROF. D-RO IVO LAPENNA

Via Moŝto Vicprezidanto de Respubliko!
Sinjoroj Reprezentantoj de la Registaroj!
Sinjorinoj kaj Sinjoroj!

Ekzistas riveroj ĉiaspecaj. (...) El vidpunkto de internaciaj rilatoj specialan signifon havas la riveroj, kiuj fluas tra pluraj landoj. Ilin oni utiligis por fiksi la limojn inter unu ŝtato kaj la alia, kelkfoje kun la celo malhelpi kontaktojn; ilian ekspluatadon oni reguligis per juraj preskriboj, ofte detalaj, komplikaj kaj ĝenaj; sporade, de tempo al tempo, iliaj bordoj estis scenejoj de kruelaj bataloj kaj iliaj akvoj ruĝiĝis pro la homa sango.... Sed eĉ en la kazoj, kiam diversaj artefaritaj baroj dumtempe malhelpis aŭ eĉ plene malebligis ilian naturan destinon, tiuj riveroj tamen plue konservis sian kunligan forton, kiu estis tiel potenca, ke ĝi ĉiam denove devige altrudis al la homoj politikajn jurajn solvojn, adekvatajn al la faktaj bezonoj kaj al la vivinteresoj de ĉiuj.

(...)

Danubo estas precize tia rivero. Verŝajne pli multe al kiu ajn alia en la mondo ĝi liveras multspecajn ekonomiajn riĉaĵojn, prezentas inspirajn naturbelaĵojn, kaj ĝia historia tasko certe ne estas disigi, sed kunligi kaj kontribui al la evoluo de amikaj rilatoj. Ĉiumomente, jam dum jarmiloj, ĝi renaskiĝas en la Nigra Arbaro, traboras al si la vojon inter altaj montoj, pasas tra ebenaĵoj, impete venkas rokegojn kaj en pompa grandiozo atingas la Nigran Maron.

(...)

Ĉe la bordoj de tiu riverego, prikantita de poetoj, eternigita en skulptaĵoj, en verkoj de pentroarto kaj muziko, eĉ en mondkonata popularа valso, etendiĝas Budapeŝto, urbo tiel ĉarma kaj bela, ke oni kutimis ĝin nomi "la reĝino de Danubo", kaj kiu ankaŭ hodiaŭ, kiam ĝi grandparte releviĝis el la ruinoj de la milito, estas konsiderata "la perlo de Danubo". (Aplaŭdo).

(...)

II.

Unuflanke, la aparte konvena situo de Budapeŝto, ie en la mezo de la grandega akvovojo, en la koro mem de Eŭropo, necese metas ĝin en pozicion de unuaranga internacia centro; aliflanke, la lingva izoliteco grave obstaklas la plenan esprimiĝon de tiu internacieco. En tiaj kondiĉoj de antagonismo inter internacieco favorata de la naturo mem kaj izoliteco altru-

data de la lingvaj limigoj, la ideo de komuna, vere internacia lingvo ne povis ne trovi jam frue eĥon, adeptojn kaj firmajn apogantojn. (Aplaŭdo).

(...)

La Internacia Lingvo jam antaŭ tre longe komencis disvastiĝi en Hungarujo, tiel ke en 1929 povis okazi nia 21-a Universala Kongreso en tiu ĉi sama urbo. Ĝi estis mia unua Universala Kongreso, kaj ĝi donis al mi la okazon uzi la lingvon por la unua fojo en konversacio kun alilandanoj.

(...)

Tiam la unuan fojon mi ankaŭ aŭdis du nomojn, kiuj por mi, same kiel por multaj, tre multaj aliaj, en la postaj jaroj iĝis nedisigeble ligitaj al Esperanto: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. (Aplaŭdego).

Dank' al tiuj du kolosoj kaj al la skolo, kiun ili fondis kune kun pluraj aliaj verkistoj, Budapeŝto ricevis plian signifon, ne plu sole por la hungaroj, sed por la mondo, ĉar ĝi fariĝis por la Internacia Lingvo kaj por ĉiuj ĝiaj uzantoj tio, kio estis siatempe Firenze por la itala. Eluzante ĉiujn internajn eblecojn, kiujn enhavis la genia verko de Zamenhof, ili sukcesis per siaj multnombraj majstraj literaturaĵoj, ĉu originalaj, ĉu tradukaj, per la kunredaktado de Literatura Mondo dum la tri periodoj de ĝia aperado, per kunlaborado en aliaj literaturaj revuoj, levi la lingvon al pli alta ŝtupo de nuancita arta esprimilo, kontentiganta eĉ la plej severajn postulojn de plensuka prozo kaj de la sublimaj suproj de poezio. (Aplaŭdo). Naskitaj en la sama jaro, ili akiris Esperanton preskaŭ samtempe: Baghy en 1911 kaj Kalocsay en 1913. Ekde tiam, kaj precipe de post la finiĝo de la unua mondmilito, ili senĉese estis aktivaj sur la literatura kampo. (...) En tiu ĉi momento, dum la inaŭgura solenaĵo mem de Kongreso, kiu okazas en la urbo de maturiĝo de Esperanto kiel literatura lingvo, mi nur deziras en via nomo, en la nomo de UEA kaj en la nomo de la tuta Esperanto-movado esprimi tutkoran dankon al Baghy kaj Kalocsay pro ilia giganta kontribuo al la Esperantlingva kulturo. (Aplaŭdo). Ili nun troviĝas inter ni kiel niaj Honoraj Kongresanoj kaj mi petas ilin akcepti en la nomo de Universala Esperanto-Asocio tiujn ĉi memoraĵojn kiel pli ol modestajn signojn de la senfinaj respekto kaj admiro, kiujn ni havas por ili: iliajn lastajn verkojn lukse kaj arte binditajn. Por Julio Baghy "Sonĝe sub pomarbo", por Kolomano Kalocsay "Reĝo Lear" (longaj aplaŭdoj dum prof. Lapenna transdonis la donacojn al la du aŭtoroj).

III.

La karakteron de nia 51-a U.K. markas la rezultoj atingitaj en la granda nova agado de UEA okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

(...)

Universala Esperanto-Asocio, kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun Unesko, estis invitita partopreni en la plenumado de la programo por JIK. Fakte, dum la Kongreso en Hago, en 1964, la Komitato akceptis specialan laborplanon por la Jaro de Internacia Kunlaboro en 1965.

(...)

Kun granda plezuro mi povas informi vin, ke tiu speciala laborplano de UEA estas plenumita kaj ke, rezulte de la agado de UEA — nome de ĝiaj centraj organoj, de la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj, lokaj grupoj kaj individuaj membroj en 85 landoj — almenaŭ 50 milionoj da personoj estis en tiu aŭ alia formo sciigitaj pri la JIK. (...)

Parto de la podio. De dekstre: s-ro E. J. Woessink, prof. K. Kalocsay, prof. G. Waringhien, d-ro Bácskai (tradukanto), s-ro K. Rödönyi (vicministro de trafiko), s-ro G. Becker, s-ro István Sarlós, f-ino M. H. Vermaas

Inter la aliaj agadoj entreprenitaj en 1965, UEA iniciatis ankaŭ kolektadon de subskriboj je propono, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la ŝtato-membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj. En mallonga tempo de iom pli ol unu jaro la proponon subskribis, laŭ la nombrado ĝis nun farita en la Centra Oficejo de UEA, entute 900 mil individuaj personoj. (...) Krome, la proponon subskribis — kaj tion mi aparte akcentas — pli ol 3700 organizaĵoj kun pli ol 63 milionoj da membroj.* (Aplaŭdego).

Kio estas la senco de tiu propono?

(...)

La adopto de la Internacia Lingvo konforme al la Propono respondas al la bezonoj de la moderna homo en la kosma erao kaj prezentas la sole ĝustan kaj racian solvon de la nuntempa lingva problemo el ĉiuj vidpunktoj: pure teknike lingva, psikologia, socia, ekonomia kaj politika. La definitiva solvo de la lingva problemo estos unu el la plej signifaj pozitivaj eventoj en la tuta kultura historio de la homaro kaj malfermos novajn perspektivojn por multe pli vasta kaj pli profunda interpopola kunlaborado sur ĉiuj kampoj: internacia kompreniĝo, vera progreso kaj paco (aplaŭdo). Ne malutilante al iu ajn ĝi prezentas nur avantaĝojn por ĉiuj.

(...)

IV.

La agado en ligo kun la JIK ne nur ne deturnis nian atenton for de la taskoj laŭ la Dua Baza Laborplano de UEA, sed male ĝuste tiu agado helpis multrilate al la plenumado de la baza programo, speciale sur la kampo de informado kaj instruado de Esperanto en la lernejoj.

Parto de la 4000 aŭskultantoj

Per tio, tamen, ne finiĝis la pozitivaj rezultoj de la JIK kaj de la kampanjo por kolektado de la subskriboj. En oktobro de tiu ĉi jaro la Propono estos transdonita al la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. Tiuokaze aparta memorando en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa kaj Esperanto estos prezentita al U Thant kaj sendita, tra du kanaloj, al ĉiuj ŝtatoj-membroj. Nombro da aliaj agadoj estas ne nur planitaj sed ankaŭ plene preparitaj en ligo kun la transdono de la Propono. Estas tute certe, ke pri tiu granda evento raportos la gazetaro, radio, televido kaj aliaj instrumentoj de la informado, kio sendube kaŭzos novan interesiĝon en la vastaj popoltavoloj pri la lingva problemo kaj pri Esperanto.

Tute senkonsidere al la sekvoj, kiujn UN donos al la Propono — kaj ni klopodos ĝis maksimumo, ke tiuj sekvoj estu adekvataj al la graveco de la demando — ni ĉiuj devos ekspluati tiun interesiĝon kaj tiun influon, kiun necese efektivigas tiel potenca premgrupo, kia estas la internacia kolektivo de la subskribintoj.

En tiu ĉi kunteksto "ekspluati" signifas intensigi ĉiujn aktivadojn laŭ la Dua Baza Laborplano de UEA, sed unuavice la agadojn, kiuj en la postulata fronta antaŭenirado iom postrestis. El ili aparte menciindaj estas la instruado de Esperanto en la lernejoj, la utiligo de la lingvo por fakaj celoj, kelkaj problemoj de nia informado kaj la plua pliriĉigo de la Internacia Lingvo per nova kultura enhavo.

(...)

V.

Mi estas konvinkita, ke la Kongreso trovos kontentigajn solvojn por ĉiuj demandoj kaj problemoj en la tagordo, precipe rilate la pli konsciencan plenumadon de tiuj punktoj de la laborplano, kiuj ĝis nun ne ricevis sufiĉe da atento. Ni havas la necesajn fortojn por realigi la laborplanon en relative mallonga tempo, kondiĉe tamen, ke ni forigu iujn negativajn fenomenojn.

El ili almenaŭ du estas menciindaj.

La unua estas la ĝena altrudado de la lingvo per troaj eksteraj signoj de la interna entuziasmo: steloj kaj stelegoj ĉiaspecaj sur vestaĵoj kovrantaj ĉiujn eblajn partojn de la korpo, sur valizoj, tekoj kaj mansakoj, pendigado de flagoj en nekonvenaj lokoj kaj neoportunaj momentoj. Mi ne deziras esti miskomprenita. Ne temas pri la portado de nia insigno — ne dek sed unu — kiel signo de nia lingvoscio kaj de nia aparteno al la movado por la Internacia Lingvo. Ankaŭ ne temas pri flagoj, eĉ multaj flagoj, okaze de niaj U.K. aŭ similaj eventoj. (...) Temas pri la troigoj, kiuj ŝanĝas la tutan sencon de la insigno kaj de la flago. Kion ni hodiaŭ bezonas, estas ne superfluaj flagoj

*) La definitivan statistikon vidu sur p. 155.

ESTRARAJ DECIDOJ EN BUDAPEST

Kun la esceptoj de s-ro Wensing kaj d-ro Albault, kiuj ne povis ĉeesti la Kongreson, la tuta Estraro de UEA kvarfoje kunsidis en Budapest. Grandan parton de la tagordo kompreneble okupis teknikaj diskutoj pri la Kongreso mem. Tamen restis tempo por solvi aron da aliaj demandoj.

Lernejoj

Laŭ interkonsento en Graz okazas reorganizo de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj. La funkciojn de prof. Lapenna kaj s-ro Zlatnar, kiuj retiriĝas, transprenas s-roj Toczyski kaj Becker respektive. Eksteraj kunlaborantoj de KKL estas prof. Lapenna (rilatoj kun internaciaj instancoj), prof. Régulo-Pérez (supera instruado), d-ro M. Dazzzini (mezgrada instruado) kaj s-ino R. Thorsen (elementa instruado).

Eldonaĵoj

Tuj antaŭ la U.K. aperis numeroj 5 kaj 7 en la serio "Oriento-Okcidento" sub aŭspicio de UEA, nome "Martín Fierro" (eldonis Stafeto) kaj "Kvin virinoj de amoro" (eld. Kosmo).

La revuo "Esperanto" estonte dediĉos pli da atento al la Dua Baza Laborplano, la Principaro de Frostavallen kaj la faka aplikado de la lingvo. La abonantaro de "La Praktiko" grade rekreskas, sed ankoraŭ ne atingis la celatan nombron. Aperis dum la U.K. la lasta eldono de "Monda Kulturo", kiu ne ricevis sufiĉe vastan subtenon kaj devis tial ĉesi. Aliflanke la Estraro decidis financi la eldonon de modesta "Gepatra Bulteno", laŭ la modelo de la iama gazeto samtitola, kies celo estos kunligi la familiojn, kiuj hejme uzas Esperanton.

La Propono al UN

Kiel membrojn de la delegitaro, kiu prezentos la Proponon al la Sekretariejo de UN en Nov-Jorko en oktobro la Estraro nomis prof. Ivo Lapenna (por UEA), d-ron Tonkin (por TEJO), s-ron Helmuth (por ELNA), s-ron Starr (por la Nov-Jorka Esperanto-Societo) kaj s-ron E. Svane (por la Esperanto-Klubo en la Sekretariejo de UN).

Universalaj Kongresoj

En la 51-a U.K. en Tel Aviv estos tri laborsekcioj: pri "Esperanto en fakoj kaj profesioj", "Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la Internacia Lingvo" kaj "Esperanto por turismo".

La Estraro esprimis unuaniman bedaŭron, ke pro pretervido aperis en la dokumentaro de la 51-a U.K. gazeto kun neneŭtrala enhavo. Ĝi aparte atentos kaj atentigos en estontaj kongresoj, ke ne okazu io simila.

---

kaj amaso da eksteraj signoj, sed konvinkaj argumentoj trafantaj konkretajn celojn; ne sekto de stranguloj en nekutimaj vestoj, sed kultura movado ĝuanta prestiĝon kaj estimon (aplaŭdo). (...)

La alia fenomeno havas identan aŭ tre similan psikologian fonon, kaj ĝi manifestiĝas en alia formo. Multaj, tro multaj personoj, nekomprenante la kompleksecon de la tuta problemo, post la komenca incendio de entuziasmo, baldaŭ malvarmiĝas. Unuj jam okdek jarojn senĉese forlasas niajn vicojn, ĉar la spektaklaj sukcesoj, kiujn ili atendis, ne venis tiel rapide, kiel ili atendis. Aliaj, pro la sama kaŭzo, ĉiam denove elpensas iajn "magiajn formulojn" kiel absolute la sola recepto por atingo de tiuj "spektaklaj rezultoj"; elĉerpas siajn energiojn kaj tiujn de manpleno da sekvantoj por evidente vanaj kaj nerealecaj agadoj, kiuj tial estas anticipe kondamnitaj je plena fiasko.

(...)

Oni povas nur esperi, ke tiuj ĉi vortoj estos komprenitaj same tiel amike, sincere kaj bonintence, kiel ili estas eldiritaj, kaj ke ili helpos al kanaligo de sendube valoraj energioj en la ĝusta direkto ne en intereso de tiu aŭ alia individuo, de tiu aŭ alia organizaĵo, eĉ ne de UEA kiel tia, sed en la intereso de kiel eble plej baldaŭa realigo de tiuj celoj, por kiuj UEA estas fondita kaj por kiuj ĝi funkcias en la nuna formo (aplaŭdego).

(...)

En la komenco mi diris kelkajn vortojn pri Danubo. Permesu al mi en la fino denove mencii ĝin kaj fari komparon.

Se ĝiaj akvoj estus limigitaj nur al la kvanto ricevita ĉe la fonto, ĝi estus sensignifa, ne konata rivereto, kiu verŝajne malaperus ie subtere, en iu lageto aŭ marĉo, aŭ eĉ sekiĝus dum sia fluado. Ĝi fariĝas ĉiam pli forta, ĉiam pli potenca, por fine atingi gigantajn dimensiojn, ĉar ĝin nutras centoj da aliaj riveroj kaj riveretoj.

Tiel same alfluu al nia komuna Universala Esperanto-Asocio el ĉiuj flankoj, de dekstre kaj maldekstre, de oriento kaj okcidento, de nordo kaj sudo, ĉiuj pozitivaj fortoj kaj fortetoj, kaj ni ŝtopu ĉiujn breĉojn por ne perdi eĉ unu el ili, ĉar nur tiel ĝi povos fariĝi tiel potenca, ke ĝi sukcesos frakasi la lastajn rokegojn de antaŭjuĝoj, superstiĉoj kaj kontraŭstaroj, kaj povos konduki la Internacian Lingvon en majesta pompo, same kiel Danubo faras post la venko de Ĝerdap, al la fina celo: la ĝeneraliĝo de la I.L. por ĉiuj internaciaj rilatoj en la intereso de ĉiuj (aplaŭdo).

NOVAJ ORGANIZAĴOJ-MEMBROJ DE UEA

Komitato akceptis 2 aliĝojn

Eble la plej grava fakto elpikebla el la longaj traktadoj de la Komitato de UEA en Budapest estas la plua vastigo de la asocia bazo. Plenan aliĝon al UEA petis kaj ricevis unu landa asocio, Konga Esperanto-Instituto (Kinshaza), kaj unu faka asocio, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). Krome la Komitato decidis akcepti kiel kunlaborantajn fakajn asociojn la organizaĵojn de muzikistoj kaj filatelistoj.

Konga Esperanto-Instituto estas la 31-a landa asocio aliĝinta, kaj la 2-a afrika. IFEF, post ISAE kaj IAJE, estas la tria faka asocio aliĝinta. Entute 21 organizaĵoj estas krome nun ligitaj al UEA per kontrakto pri kunlaboro.

Kiel ĉiujare, la Komitato zorge trastudis la Estraran Raporton pri la pasinta laborjaro kaj ĝin aprobis. Same ĝi aprobis la raporton de CED, kun aparta dankesprimo al ĝia direktoro. La ceteraj diskutoj centriĝis ĉirkaŭ la konkludoj de la tri komisionoj - pri financoj kaj administrado, pri la Laborplano kaj pri fakaj organizaĵoj - kaj ĉirkaŭ diversaj proponoj pri ŝanĝoj en la Kongresa Regularo.

Ankaŭ koridore daŭras diskutoj Vicprezidanto Carlén aŭskultas



Kongresanoj ricevos "Esperanto"

La detalajn ŝanĝojn de la Kongresa Regularo ni publikigos aliloke. La ĉefa aspekto estas, ke estonte tiuj aliĝantoj al la U.K., kiuj ne estas membroj-abonantoj de UEA, pagos pli altan kongresan kotizon (per aliaj vortoj, la membroj-abonantoj ricevos pli grandan rabaton je la kongresa kotizo). Kompense, la kongresanoj, kiuj ne estas MA de UEA, ricevos dum la tuta jaro, en kiu okazas la U.K., la revuon "Esperanto". Per tio ili pli bone povos sekvi la evoluon de la kongresaj preparoj kaj eble ekdeziros estis MA de UEA.

Laboro de la komisionoj

La komisiono pri financoj kaj administrado pristudis ankaŭ la buĝeton por 1967, kiun laŭ ĝia propono la Komitato aprobis. La nova buĝeto (Jarlibro 1966/II p. 21) kombinas rigorajn ŝparojn kun novaj kotizoj por individuaj membroj, altigitaj per 25%. Tiel, ekzemple, la nova kotizo por membro-abonanto en 1967 estos 25,— gld.

La sama komisiono rekomendis: esplori la eblecojn, presigi iujn eldonaĵojn de UEA ekster Nederlando; liberigi per donacoj la domon de UEA el la hipoteko; plane varbadi reklamojn por la revuo "Esperanto".

La komisiono pri la Laborplano havis la taskon aparte atenti al informado kaj lernejoj. Ĝi rekomendis: grandskale utiligi la rezultojn de la JIK por informa kampanjo; ĉiujare kunvenigi ĉefdelegitojn de UEA por interŝanĝo de spertoj pri varba laboro; diskonigi la konkludojn de la 2-a Lerneja Konferenco.

La tria komisiono, pri fakaj organizaĵoj, emfazis unuavice la gravecon de laŭplana plibonigo de la fakdelegita reto de UEA, tiel apogante la konkludojn de la 1-a Ĝenerala Kunveno.

FAKA APLIKADO DE ESPERANTO

La Unua Ĝenerala Kunveno de UEA havis kiel temon "Esperanto en la fakoj". Prezidis prof. Lapenna, dum raportis s-ro M. Jaumotte. Lia raporto vekis viglan diskutadon, el kiuj la jenaj ĝeneralaj konkludoj estas resumeblaj.

1. Laŭ la raportanto, necesas ŝanĝi nian sintenon al la fakdelegita reto por logike kaj celkonscie evoluigi ĝin. Ĝis nun la FD sin anoncis pli-malpli hazarde. Eventuale oni povus krei vic-ĉefdelegitojn, kies esenca tasko estus plane kreskigi la fakdelegitaron.

2. En kelkaj kazoj necesas vastigi la bazon de la fakaj organizaĵoj por doni al ili pli da stabileco. La aŭtomobilista organizaĵo, ekzemple, povus esti la kerno de ĝenerala turisma organizaĵo.

3. Necesas elimini abstraktajn diskutojn kaj konkrete labori laŭ la principoj difinitaj por fakaj organizaĵoj en la Dua Baza Laborplano.

4. Pli da fakaj asocioj aliĝu al UEA laŭ la ekzemplo de ISAE, IAJE kaj IFEF, por povi rekte kunlabori en la Komitato de UEA.

50 diligentaj kolektantoj

La Dua Ĝenerala Kunveno, sub prezido de s-ro Carlén kaj en ĉeesto de pluraj estraranoj de UEA, donis al la vasta kongresanaro okazon libere diskuti la Estraran Raporton kaj ricevi kompetentajn respondojn de la koncernaj estraranoj. La diskutado turniĝis ĉirkaŭ la libro-katalogo de UEA (laŭdoj), la ebleco presigi alilande eldonaĵojn de UEA, la enhavo de "Esperanto", la kantado de "La Espero" (por kaj kontraŭ), Internacia Arta Teatro (laŭdo), la ĝenoj, kiujn kaŭzas malfruaj kongresaliĝoj (postuloj pri rigora limigo) kaj la nepra neceso, koncize raportadi al la esperantlingvaj radiostacioj, ĉu laŭde, ĉu mallaŭde, pri la aŭskultado.

La ĝenerala sekretario aparte informis pri la kolektado de subskriboj por la Propono al UN. Li atentigis, ke nura kvindeko da personoj en diversaj landoj kune kolektis preskaŭ 170 000 individuajn subskribojn. Ili meritas almenaŭ, ke oni diskonigu iliajn nomojn: Georgi kaj Nikolaj Mihajlovi, Bogoljub Grabarevič, Penčo Petrov, Molnár lászló, Wágner andrás, Vera Kirilova, Stanislav Čáp, Kunčo Vâlev, Hans Bürger, Nadeĵda Čiplakova, Stankó istván, Remy Van-Eynde, Nikola Mladenov, Max Müller, Vivaldo Marcelino da Silva, Varga lajos, Anny Enzlin, Karl Friedl, Lazar Mladenov, Julius Balbin, Adalbert Masuhr, Boris Veličkov, José Jacob, Hendrik De-Roover, Jan Kafka, Georges Vanbreuse, Dinjo Stankovski, Santa terezija, Günther Becker, Dosjo Dimitrov, Blesić margita, Janka Daskalova, Adriana Ravoni, Odette Albault, Erdelji laslo, Georgo Csüllög, Svilen Sokolov, Lisette De-Winter, Jos. Hérion, Georgi D. Mihajlov, Glauco Corrado, Amy Nilsson, Ivan Canev, Velika Gaĉeva, J. M. Nagy, Paulo Amorim Cardoso, Monrad Christensen, Walter Kaukal, Anna Alamo-Sandgren. Ĉiu el ili kolektis minimume 1000 individuajn subskribojn.

Laŭ la tradicio, en la Unua Ĝenerala Kunveno krome aŭdiĝis salutoj de diversaj fakaj organizaĵoj, dum en la Dua la samaj organizaĵoj havis okazon raporti al la Pleno pri sia dumkongresa laboro. Ne mirige, la Ĝeneralajn Kunvenojn vizitis pli da kongresanoj, ol en antaŭaj jaroj. Tamen la nombro ne indikis grandan interesiĝon, kaj oni devas demandi al si, ĉu la procedura formo de tiaj kunvenoj ne estus plibonigebla por doni pli da kohereco.

Kunvenis Informaj Fakoj

Ekzemplo de tia pli kohere organizita kunveno estis tiu de la Informa Fako de UEA, kiun ĉeestis nur reprezentantoj de la Landaj Informaj Fakoj. Sub prezido de s-ro Becker, estrarano pri informado, okazis fruktodona diskuto pri la Kongresa Gazetara Servo kaj pri la Principaro de Frostavallen. La interŝanĝo de spertoj estis aparte valora ĝuste nun anticipe al la prezento de la Propono al UN en oktobro kaj la posta tutmonda informa kampanjo.

Atenta aŭskulto. En la unua vico de dekstre: Ibrahim Tambura, Lajos Tárkony, Valéria Szabó, E. A. Bokarev.

OMAĜO AL KALOCSAY KAJ BAGHY



Julio Baghy

La persona ĉeesto kaj antaŭanoncita partopreno de Kalocsay kaj Baghy en la kunveno de la Belartaj Konkursoj superplenigis la ĉambron per pli ol 250 personoj. La sekretariino de la Belartaj Konkursoj raportis, ke nuntempe venas duoble pli da konkursaĵoj, ol antaŭ kvin-ses jaroj. Post proklamo de la ĉi-jaraj rezultoj fare de la prezidanto, prof. Waringhien, li mem kun s-inoj E. Lapenna kaj Eli Urbanová deklamis iujn el la premiitaĵoj.

Aŭtoro de la Jaro: Budapeŝtano

Prezentite de la sekretario de eldonejo Koko, f-ino Marjorie Boulton anoncis kaj motivis la aljuĝon de la "Arĝenta Sprono" al Lajos Tárkony pro lia poemaro "Soifo", kaj la ĉeestantoj havis la plezuron aŭdi el la buŝo de la aŭtoro mem emocian deklamon de la poemoj "Soifo" kaj "Spegulo".

Estis tio taŭga enkonduko al la kulmino de la kunveno: deklamado de Baghy kaj Kalocsay. Tre karakterizaj estis la poemoj ("Krono kaj kateno" kaj "Samtempaj sezonoj") elektitaj de Julio Baghy, kiu kiel kromregalon aldonis versaĵon ("Deziro de grandveziro") el sia baldaŭ aperonta nova volumo "Ĉielarko".

"Ne distri, sed emocii". Tiel Kalocsay difinis sian intencon, kaj per sia esperantigo de unu tabulo el la mesopotamia Gilgameŝ-eposo (pri la morto de Enkidu) li videble sukcesis. Kiam la aplaŭdoj fine kvietiĝis, ambaŭ aŭtoroj malaperis inter sennombraj gratulantoj kaj aŭtograf-petantoj.

Poeto kun popolo: Kalocsay deklamas



La Oratora Konkurso

Nekontentiga estis ĉi-jare la partopreno en la Oratora Konkurso: nur 4 kandidatoj sin anoncis. Juĝis: Ivo Osibov, Nobojuki Ŝoji, Giuliano Turone. Tre klare venkis Aŝvinikumar' (temo: "Estas vere malfacilege priskribi la eterne senŝanĝan homecon"), kies plena rego de la gest-arto garantiis al li ripeton de la sukceso en Hago en 1964.

BELARTAJ KONKURSOJ

Originala poezio

1. Wouter Pilger (Nederlando): "Hiroŝige".
2. Eli Urbanová (Ĉeĥoslovakujo): "Tuko".
3. Jiří Kořínek (Ĉeĥoslovakujo): "Hejme"; Violin Oljanov (Bulgarujo): "La pordo fermiĝis" — du egale.

Laŭda mencio:

5. Jiří Kořínek (Ĉeĥoslovakujo): "Preĝejo".

Tradukita poezio

1. Wouter Pilger (Nederlando): "Balado de kontraŭdiroj" de François Villon (1431- post 1463).
2. Carmel Mallia (Malto): "La lanternisto" de Anton Buttiĝieĝ (n. 1912).
3. Carmel Mallia (Malto): "La bovo" de Ĝorĝ Pisani (n. 1909).

Laŭda mencio:

4. Julio Varga (Hungarujo): "Je l' morto de damo" de Alfred de Musset (1810-1857).

Originala prozo

1. Ne aljuĝita.
2. Tibor Sekelj (Jugoslavio): "La trezoro de la inkao".
3. Andreo Szabó (Hungarujo): "Montdekliva nupto".

Originala dramo

1.-3. Ne aljuĝitaj.

Laŭda mencio:

4. Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio): "Aventuroj de Nasradin Hoĝa".

Nova Talento

Vilmos Benczik (Hungarujo) pro poemo "Aborto".

La foto-konkurso

ĉi-jare ne okazis pro neadekvata partopreno.

ORATORA KONKURSO

1. Aŝvinikumar' (Hindujo).
2. Ne aljuĝita.
3. Ibrahim Tambura (Malio).

ARĜENTA SPRONO DE KOKO

Lajos Tárkony (Hungarujo) pro la originala poemaro "Soifo" (eld. Stafeto).

LA TEATRAJ PREZENTOJ

Michel Duc-Goninaz recenzas:

La programo de la Tria Arta Festivalo, okazinta en la kadro de la Budapeŝta Kongreso, estis tre riĉa. Tro riĉa eĉ, ĉar estis malfacile por la meza kongresano trafi ĉiujn prezentadojn promesitajn en la Teatra Programo, kiun oni ĉi-jare eldonis tute prave aparte de la Kongresa Libro.

Kataki — Malamiko

La Teatro de Łódź, kiu devis ludi en ejo ne tre taŭga por teatra spektaklo — la ĉambrego Zamenhof de la Kongresejo — prezentis la dramon de la usona verkisto Shimon Wincelberg: "Kataki — malamiko", jam luditan pasintjare en Tokio.

Dum la japana-usona milito, unu usona aviadisto paraŝutfalas sur insulon okupitan de unu japana soldato, kiun la okazintaĵoj izolis sur tiu ĉi malkomforta loko. La tuta dramo spegulas la evoluon de la rilatoj inter la japano, kiu ne konas la anglan lingvon (tradukitan al Esperanto, kompreneble) kaj lia "kaptito", kiu ne komprenas la japanan. Malfacila kunekzistado, iompostioma amikiĝo kaj tragedia fino: Kimura, la japano, sin mortigas por ne iĝi kaptito de la alproksimiĝanta usona armeo. Unu recenzisto asertis pasintjare, ke "en la drama formo estas montrita la tragika efiko de la lingvaj baroj". Pli ĝuste estus diri, ke estas montrita la efiko de la naciaj edukado kaj civilizo: por la japano, la usona soldato estas malkuraĝulo, kiu preferis hontindan saviĝon ol gloran morton, por la usonano, la japano estas fanatikulo, por kiu ĉiu homa sento nulas kontraŭ la nehoma devo de la "honoro". La uniformo, kiun portas ĉiu el ili, igas vanaj ĉiujn klopodojn kompreni kaj eĉ helpi unu la alian.

Ambaŭ aktoroj bonege ludis: Lucjan Wiernek (Alvin), kun juneca facilmoviĝemo kaj usona senĝeno, Czesław Przybyła kun la necesa japana senemociiĝo. Wiernek parolis fojfoje ne sufiĉe klare — pri tio eble kulpis ankaŭ la akustikaj kondiĉoj de la ejo — sed pri la japana elparolo de Przybyła mi ne kompetentas juĝi. Sed ĉe ambaŭ la mieno kaj mimiko estis bonegaj (ĉefe ĉe Przybyła, kies rolo, kvankam preskaŭ muta, estis tre malfacila). Bonegaj dekoracioj kaj sonefektoj.

BET trompis esperojn

La Bulgara Esperanta Teatro prezentis al la publiko varian programon, konsistantan el kvar unuaktaĵoj kaj kantoj, iom seniluziigan. Oni atendus ion alian de trupo, kiu havas tiajn eblecojn kaj kapablojn.

Dum la Lerneja Konferenco en Graz, iu severa observanto akre kritikis la nealtan nivelon de kelkaj eroj prezentitaj de infanoj dum varietea vespero, post kelktaga preparo. Nu, kion diri pri la komedio de May Thalvest, titolita "Familiaj problemoj" laŭ unu programo kaj "Familia miskompreno" laŭ la alia, krom tio, ke ĝi pli taŭgus por prezentado dum lerneja festo ol dum Arta Festivalo? Tiu ĉi ideologia komedio pri la apliko en la hejmo de la principo de egalrajteco de la virinoj estas plena je bonaj intencoj, sed ĉiu scias, ke ne per bonaj intencoj oni faras bonan literaturon — aŭ teatron.

"La du ŝtelistoj" de Branislav Nušić estas iomete pli alloga. Temo: kio pli gravas, ŝteli la monon aŭ la honoron de la forestanta domposedanto kaj edzo? En la renkonto de la edzinamanto kaj de la ŝtelisto, la aŭtoro donis la pli belan rolon al tiu ĉi lasta. Ankoraŭ unu bona intenco (kvankam la aŭtoro ŝajnas meti la virinon sur la sama nivelo kiel la monon kaj tute forgesas peti ŝian opinion!), kun sufiĉe sprita dialogo, sed al Olga Popova pli taŭgis la rolo de bona kaj iom naiva edzino, kiun ŝi ludis en "Familiaj problemoj", ol tiu de trompema edzino, kiun oni trudis al ŝi en la *Du Ŝtelistoj*.

La ludado de la famekonata komedio de Ĉeĥov, *La Urso*, estis ĝenerale bona. Rimarkinda estis la interpreto de la vidvino fare de Belka Beleva, sed Anani Anev ne sufiĉe draste ludas la urson. De la komenco, li aspektas pli senzorga gajulo ol krudulo. Li certe estis pli bona en la *Edziĝpropono* de Ĉeĥov, ludita en Hago antaŭ du jaroj.

La plej bona ero de tiu programo estis certe la dialogo "Dio Absolvu" de Elin Pelin. Kiel vidvo kaj vidvino svatas unu la alian en la kamparo: laŭ tiu ĉi temo disvolviĝas ĉarma dialogo, kiu estas samtempe psikologia, primora kaj socia studo, al kies sukceso eminente kontribuis la du rolantoj, kiujn mi denove aplaŭdas skribante ĉi tiujn liniojn: Georgi Kerelezov kaj Kostadinka Nedeva. Sed oni komprenas, kiel bedaŭrinde estas, ke la plej bona ero el la programo estas ĝuste tiu, kiu en normalaj cirkonstancoj taŭgus kiel kurtenleviĝo.

Internacia Arta Teatro

Ĝuste la "kurtenleviĝan ŝercon" de F. Molnár, *La Unua Paŝo*, mi maltrafis pro elektropaneo, kiu devigis mallongigi unu el la spektakloj de Internacia Arta Teatro (okazintaj en la nova Teatro Madách).

La Morto de Lia Ekscelenco, unuafoje prezentita en Hago en 1964, estis ĉifoje ludita en plibonigita enscenigo. Ni retrovis Mladen Šerment en la rolo de la mortonta diktatoro. Eble li devus plisobrigi siajn movojn dum la sceno de la sonĝo, kiu devas okazi en etoso de nerealo, bone sugestita de la lumefektoj. Sed kial do la redaktinto de la programo asertas, ke en tiu ĉi dramo "sentiĝas la antaŭmilita epoko"? La valoro de la *Morto de Lia Ekscelenco* kuŝas ĝuste en tio, ke ĝi estas ĉiam ankoraŭ aktualeca, eĉ se tie kaj tie la modernaj ekscelencoj estas alie nomataj.

Sed la ĉefaĵo de tiu programo estis certe la *Holanda Pupo.* Tiu vodevilo de Julio Baghy pri la feliĉa kronado de dumkongresa amo havas sendube temon facilan, eĉ bagatelan, sed la teksto, plena je spritaĵoj, donis la okazon al Srdjan Flego kaj lia trupo ellabori unuarangan komikan spektaklon, emajlitan per duetoj laŭ muziko de M. Sárosi. Ĉiu situacio, ĉiu ŝerco estas eluzita de la reĝisoro kaj aktoroj, kaj la rezulto estas scena juveleto, kian oni ĝis nun verŝajne malofte vidis sur la scenejo de esperantlingva teatro.

Elektinte ĉi tiun vodevilon, S. Flego duoble trafis: unuflanke la publikon, al kiu certe plaĉis la temo tirita el la esperantista vivo kun satira spicaĵo kaj kiu certe aprezis la omaĝon faritan al nia plej populara kaj amata verkisto en lia propra urbo; aliflanke . . . sin mem. Flego eminentaŝ en la vodevila ĝenro, en ĉio, kio donas lokon al improvizo, al komikaj efektoj, al kanzonoj. Li estis, dum tiu prezentado, en la pleno de siaj kapabloj. Nia Skapeno elektis por si, kompreneble, la rolon de la servisto Miŝi, kaj konfidis la rolon de la patro al bonega aktoro, kiun ni esperas revidi estontece sur la scenejo de IAT: Franjo Majetić. Kunludis Vanča Kljaković en la pli facila rolo de la fianĉo kaj Zdenka Heršak en la rolo de Nel: ankaŭ ŝia rolo estis sufiĉe facila, sed ŝi kantas agrable, kaj rigardi tian pupon estaŝ ja plezuro!

Geaktoroj de "La sorĉa fajrilo"

Aplaŭdinda Ifigenio

Por kompreni, kion oni povas fari per malmultaj rimedoj, sufiĉis ĉeesti la prezenton de la Teatro de unusola aktoro "Rapsodo" el Bjalistoko, kiu prezentis la tragedion de Roman Brandstaetter *La Morto sur la marbordo de Artemido,* en traduko de Lech Piotrowski kaj en interpreto de unusola aktorino Karina Waśkiewicz, kiu do ludis - ĉar temis ja pri ludo, ne pri simpla deklamo - ĉiujn rolojn de tiu nova pritrakto de la tragedio de Ifigenio. Ŝi estaŝ kaj Ifigenio kaj Agamemnon kaj Klitemnestra kaj aliaj . . . Elparolo absolute senriproĉa, voĉo kaj vizaĝesprimo mirinde ŝanĝeblaj, movoj sobraj sed esprimivaj: per ĉio tio Karina Waśkiewicz altiris al si la malavarajn aplaŭdojn de la multnombra publiko kunveninta por tiu "arta paŭzo". Kiu do diris, ke la esperantista publiko ne kapablas aprezi altnivelan spektaklon?

La amatoroj de pupteatro povis spekti la *Sorĉan Fajrilon* de Andersen, interpretitan de la hungara Ŝtata Pupteatro. Spektaklo iom tro infaneca por plenkreskuloj, iom tro longa por infanoj. La ejo ne estis tre taŭga kaj la parolo ne ĉiam klare aŭdebla.

Resume: kompare kun la Haga Kongreso, dum kiu la nura I.A.T. donis al ni tiajn spektaklojn, kiel la *Edziĝpropono* de Ĉeĥov, *Sen Eliro* de Sartre kaj *La Leciono* de Ionesco, la Budapeŝta Festivalo estis relative malpli sukcesa, se oni konsideras la abundecon kaj la variecon de la proponitaj spektakloj. La unuan lokon mi senhezite donas al la *Holanda Pupo;* duavice elstaras *Kataki - Malamiko* kaj *La Morto sur la Marbordo de Artemido.* Jen do tri verkoj tre malsimilaj, sed pri kies sukceso povos mediti niaj reĝisoroj, kiam ili ellaboros la estontajn programojn de niaj kongresoj kaj festivaloj.

ALIAJ ARANĜOJ DE LA ARTA FESTIVALO

Teatro de unu artisto

Tute alian teatron de unu artisto, ol Karina Waśkiewicz, prezentas Jadwiga Gibczyńska. La teksto, kiun uzas Gibczyńska, estas monologo, rakonto de unu heroo aŭ heroino, sed en ĝin enplektiĝas de tempo al tempo la voĉoj de aliaj personoj. Tiel estas ĉefe en la scenigita fabela rakonto de A de Saint-Exupéry, "La eta princo" (en la traduko de P. Delaire).

Tute alia ŝi estas en la monologa dramo de Finn Methling "Vojaĝo al verdaj ombroj". Ŝi prezentas tie nur unu personon, sed ŝi devas roli ĝin de suĉinfana aĝo ĝis la morto en maljuneco, kiu devas esti la sojlo de alia, nova vivo. Estas vere mirinda la kapablo, sur alta arta nivelo, de Gibczyńska, prezenti al spektantoj la ludojn de infaneto, la ĝojojn de amanta knabino, la ĉagrenojn de virino kaj patrino - kaj fine la grizan maljunecon de vidviĝinta avino.

Malwina Szczepkowska

La hungara vespero

Tre longa programo de hungaraj muziko kaj dancoj okupis apartan kongres-vesperon. Pri la artoj de la lando ĝi donis tre unuflankan impreson, ĉar la podion okupis seninterrompe potenca kord-orkestro, jen apogante tiun aŭ alian ĉef-violoniston, jen akompanante kantojn aŭ dancojn. En preskaŭ ĉiuj eroj la t.n. ciganmuziko aŭ superregis aŭ trasentiĝis.

Al la plimulto certe plaĉis la vervaj, multkoloraj dancoj kaj la energio de la gekantistoj. Tamen nur unu-du kantoj estis parte en Esperanto, kaj la programo kiel tuto povis esti multe pli varia kaj instrua.

Libervola teatro

Ekster la oficiala kadro de la Arta Festivalo okazis "Libervola Teatra Prezentado" de IAT. Laŭ ĉiuj raportoj, tamen, ĝi estis neatendite nekontentiga, kio almenaŭ parte pravigas la malgrandecon de ĝia publiko.

Ceteraj programeroj

La teatran programon de BET (vidu p. 149) garnis kaj interspacigis la unuarangaj voĉoj de Veselin Damjanov kaj Valentina Despotova, kies solkantado - respektive leĝera sed esperantlingva, kaj bulgarlingva sed virtuoza - trovis ĉiuflankan aprobon.

La relative amasa partopreno de japanoj en la Kongreso motivis la inkluzivon de specialaj

Intensa interesiĝo pri elmontro de ikebano - japana floraranĝa arto - en la kadro de la Arta Festivalo.

elmontradoj pri ĉanojo (te-ceremonio), ikebano (flor-aranĝo), belskribado, sorobano (bido-kalkulado) kaj paperfalda arto. Ĉiuj allogis multajn spektantojn kaj lernemulojn.

La festivalan programon kompletigis prelego de Roland Dupuis, "Frédéric Chopin, animo de l'piano", kiun ilustris muzikaj ekstraktoj kaj diapozitivoj. La dufoja prezento estis tre favore akceptita.

Fine ni ankoraŭ menciu sub tiu ĉi rubriko la plurajn prezentojn de la filmo "Angoroj", la filmon de Oomoto i.a. pri la Oomoto-Festivalo de 1965, kaj apartan prezenton de unuakta dramo de Marjorie Boulton. V.S.

OK PRELEGOJ PRI LITERATURO KAJ ARTO

Kvankam malbona sorto trafis la 19-an sesion de la Internacia Somera Universitato — la Rektoro, prof. Géza Bárczi, malsaniĝis, kaj la du aziaj prelegantoj origine akceptitaj pro diversaj malhelpoj ne povis vojaĝi Hungarujon — tamen la programo, en la kadro de la Arta Festivalo, estis varia kaj instrua.

Ĉi tie ni prezentas la ĉefan enhavon de tiuj prelegoj, kiuj rilatas al Esperanto aŭ al Unesko, dum la ceterajn pro spacomanko ni nur mencias. En "Esperanto" ni publikigos de tempo al tempo indikojn, kie trovi la publikigitajn tekstojn de ISU-prelegoj.

La inaŭgura parolado de prof. Bárczi, membro de la Hungara Akademio de Sciencoj, tuŝis la gravecon de la kongresoj kaj precipe de ISU por la glata evoluigo de la lingvo. ISU ludas gravan rolon de disvolvo kaj renovigado de la scienca terminaro kaj por unuecigo de la scienca stilo. Post la pli vasta akcepto de la Internacia Lingvo, ISU povus fariĝi grava memstara scienca institucio. La paroladon voĉlegis la sekretario de ISU.



Prelegas prof. Bokarev (Soveta Unio)

Protekto de aŭtoraj rajtoj

En la unua prelego de la sesio prof. Ivo Lapenna, nuntempe docento pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en la Universitato de Londono, montris, kiel aŭtorrajtaj leĝoj celas harmoniigi individuajn kun sociaj interesoj. Aŭtoroj ja ne kreas en vakuo, sed ĉerpas el la kultura trezoro de la socio. La preleganto skizis la historion de tiaj leĝoj kaj per ekzemploj difinis iliajn objektojn kaj subjektojn. Naciaj leĝoj tre varias, tial la Berna Konvencio de 1886 kaj la Universala Konvencio de Unesko de 1953 celis establi internacian protekton. La Universalan Konvencion ratifis multaj, sed ankoraŭ, bedaŭrinde, ne ĉiuj ŝtatoj. Tamen ĝi estas grava paŝo al glatigo de kulturaj interŝanĝoj.

La Budapeŝta skolo

Estis logike, ke ISU-sesio en Budapest inkluzivu tiun temon. Kaj kiu pli trafe povus ĝin trakti, ol prof. Gaston Waringhien, samtempe "ekstera observanto" kaj intima kunlaboranto de la Budapeŝtanoj? Li spuris ĝian disvolviĝon ekde la fruaj dudekaj jaroj, kiam renkontiĝis Baghy, Kalocsay, Balkányi kaj T. Schwartz, tra la maturiĝo kaj ĉefatingoj de Baghy kaj Kalocsay, tra la tri periodoj de "Literatura Mondo", ĝis ties malapero en 1949, kiam glaciiĝis la internaciaj rilatoj. Ĝian plej floran periodon karakterizis la vastigo de la vortaro kaj la disputoj, kiujn tio kuntrenis. Sed ĝia plej grava kontribuo estas la "ĉiam imitindaj modeloj de pura lingvo kaj de alta stilo".

Fonetiko, interlingvistiko

Lingvistikajn temojn prezentis prof. E. Bokarev, vic-direktoro de la Lingvoscienca Instituto de la Sovetunia Scienca Akademio, kaj d-ro I. Szerdahelyi, konata aŭtoro de lernolibroj de la rusa kaj de Esperanto. Prof. Bokarev unue klarigis la konceptojn de fonemo kaj alofono. Unueca prononco de Esperanto signifas striktan distingadon de fonemoj sed ne postulas uzi difinitajn alofonojn. La prelegant ilustris siajn argumentojn per abundaj ekzemploj el diverslandana uzo de Esperanto. La prelego de d-ro Szerdahelyi celis atentigi pri la valoro de Esperanto kiel lingvistika laborilo en la studo de "modeligo" de lingvoj, ekz. rekonstruado de hipotezaj pralingvoj.

Aliaj prelegoj

Siajn klarigojn pri la "Metriko kaj deklamarto de la hindia lingvo" d-ro Aŝvinikumar' abunde ilustris per propra brila deklamado, proponante siajn solvojn de la problemo, kiel adapti hindiajn metrojn al Esperanto.

Josip Vrančić, universitata prelegisto pri arthistorio, klopodis montri al la fontoj de la pentro-artaj formoj de la 20-a jarcento. Stojan Djoudjeff, katedrestro en la Ŝtata Muzikakademio en Sofio, per inversa proceso iluminis la postrestaĵojn de antikva muziko en la popola kulturo de balkanaj landoj. Fine, Imre Ungár, internacie renoma koncertpianisto, ilustris per fortepiana verko "15 hungaraj kamparanaj kantoj" sian tezon pri la komponisto Béla Bartók kaj la hungara popolmuziko.

Ĉiuj prelegoj de la sesio allogis po 200 ĝis 400 aŭskultantoj, kaj kelkaj el ili sendube ricevus multe pli grandan publikon, se la disponeblaj salonoj estus pli vastaj. La kompleta programo de ISU aperis presite en la hungara kaj Esperanto kaj iris al pli ol 500 universitatoj tra la tuta mondo.

EN KAJ EKSTER LA PROGRAMO

La oficialaj distraj aranĝoj bone sukcesis. Por la Interkona Vespero kaj Balo ja ne mankis spaco en la vasta Petöfi-pavilono kaj ĝia agrabla ĉirkaŭaĵo. La Bankedon partoprenis 460, en granda restoracio Gundel. La Junulara Vespero, laŭdire, fariĝis junulara balo.

Kvar tuttagaj ekskursoj kun amasa partopreno celis ĵaŭde al la ĉefaj turismaj vidindaĵoj de Hungarujo, kun kelkloke oficialaj akceptoj de lokaj aŭtoritatoj. Ankaŭ la tagaj kaj noktaj ekskursoj tra Budapest allogis multajn.

La 10-a Internacia Infana Kongreseto donis al 86 Esperante-parolantaj infanoj el 12 landoj eblecon amike kunvivi dum unu semajno. Per propra distra programo ili salutis plenaĝajn vizitantojn.

Diservoj katolika kaj evangeli-kristana okazis dimanĉe. La unuan partoprenis 1500 personoj, kaj ĝia meso uzis Esperanton (la unuan fojon en la historio de la U.K.-oj) laŭ la antaŭnelonga decido de la Papo.

En apartaj kunvenoj renkontiĝis la Akademio de Esperanto, fervojistoj, juristoj, sciencistoj, ŝakludantoj, aŭtomobilistoj, instruistoj, fotistoj, arkitektoj, blinduloj, ornitologoj, skoltoj, studentoj, ĵurnalistoj, medicinistoj, veteranoj, katolikoj, evangeli-kristanoj, bahaanoj, militrezistantoj, M.E.M., turistoj, virinoj, agrikulturistoj, interstenistoj, teknikistoj, filologoj, pupteatristoj, I.O.E., redaktoroj, ruĝa-krucanoj, E.K.I.K., naturamikoj kaj ankoraŭ aliaj — vere io por ĉiu. La raportojn oni trovos en la koncernaj fakaj gazetoj.

Oficialajn akceptojn aranĝis la Prezidantaro de la Hungara Respubliko (en la inspire bela Parlamentejo), la ambasadoj aŭstra, pola kaj usona, la Landa Konsilantaro de Hungaraj Virinoj k.a. Siaflanke la Japana Nacia Komisiono por Unesko montris sian interesiĝon, subvenciante la reprezentiĝon de Japana Esperanto-Instituto en la Kongreso.

La kongreslandon konigis al vizitantoj la "Hungara posttagmezo", kun prelegoj pri popolkantoj, historio de Budapest kaj etnaj ligoj de hungaroj, kaj aparta ekspozicio pri "Hungara tero, hungara popolo" aranĝita ekster la Kongreso. Krome estis vizitebla tre bone aranĝita ekspozicio "La Internacia Lingvo en Hungario" kun valorega kolekto da historie interesaj eldonaĵoj. Vitrinoj kun Esperantaj eldonaĵoj ornamis ankaŭ partojn de la pavilono Petöfi.

Ornamaĵoj pro la Kongreso estis rimarkeblaj jam ĉe la landlimaj stacioj de fervojo kaj en multaj stratoj kaj vendejoj de la ĉefurbo. Pli daŭran memorigilon la urbo ricevis per la solena inaŭguro de nova Esperanto-Parko apud Danubo.

Novaj libroj, broŝuroj kaj faldfolioj aperis abunde okaze de la Kongreso el hungaraj eldonejoj, kiuj ĝis antaŭ nelonge neglektadis la Internacian Lingvon. Detalojn vidu sub la rubriko "Ricevitaj eldonaĵoj". Furore sukcesis la jubilea libro de Kalocsay kaj Baghy "Ora duopo", laŭdire jam elvendita dum la Kongreso. Ĉu ĝi aŭ la (168-paĝa) Kongresa Libro estis pli legata, malfacile estus decidi.

La Kongresa Gazetara Servo laboris senĉese kaj diligente, eldonante 32 paĝojn da bultenoj en Esperanto kaj similan kvanton hungare. Sukcesan gazetaran konferencon komence de la semajno ĉeestis i.a. reprezentantoj de hungaraj radio, televido kaj kino, la novaĵagentejoj "Nova Ĉinujo" kaj MTI (hungara), kaj aliaj el Germanujo kaj Kipro.

Restas nur esperi, ke la nacilingvaj tradukoj faritaj laŭ la Kongresa Gazetara Servo ne estis tute laŭliteraj. Laŭ la Esperanta eldono, "la partoprenantoj proponis elektri la novan, pli aktivan estraron"!

La Internacia Ekzamena Komisiono esploras kandidaton. De maldekstre: Marjorie Boulton, Juan Régulo-Pérez, Julio Baghy, Victor Sadler. Kvar kandidatoj prezentiĝis al la Komisiono en Budapest por skriba kaj parola ekzamenoj. Rezultoj aperos en posta eldono de "Esperanto".

KULMINO DE UNUSEMAJNA LABORO

La Solena Fermo neniam estas nura solenaĵo. Ĝia funkcio estas meti punkton sur la "i" de la Kongreso, resumi la faritajn laborojn. Tial la Rezolucioj, pli frue traktitaj en la Estraro kaj Komitato kaj unuanime aprobitaj de la Pleno, okupas tiel gravan lokon sur ĉi tiuj paĝoj. Ĉi-jare ili havas apartan signifon, ĉar ili resumas ne nur la laborojn de la U.K. sed tiujn de la tuta antaŭa jaro: Jaro de Internacia Kunlaboro.

Kvankam multaj jam devis frue forvojaĝi, pli ol kutime granda parto de la 4010 aliĝintoj (tiun nombron superis nur Nürnberg, 1923) ĉeestis sabatmatene. Per aplaŭdo ili salutis, tutunue, la honoran prezidanton s-ron Holmes kaj aprobis sendon de saluttelegramoj al honora prezidanto Malmgren kaj al Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo, kiel plej eminenta apoganto de la Propono al UN.

Pri la laboro de la Estraro kaj Komitato koncize raportis ĝenerala sekretario Günther Becker (vidu p-jn 145, 146). La kongresajn rezoluciojn prezentis la prezidanto, kiu krome informis, ke la Proponon al Unuiĝintaj Nacioj transdonos en Nov-Jorko en oktobro 6-persona delegitaro de UEA. D-ro H. R. Tonkin, nova ĝenerala sekretario de TEJO, raportis pri la antaŭe okazinta Internacia Junulara Kongreso en Pécs, kun pli ol 1000 partoprenantoj. (Sekvos detaloj en oktobro.)

El la premiitoj de la Belartaj Konkursoj, kiujn anoncis prof. Waringhien (vidu p. 148), persone transprenis siajn diplomojn s-roj Tibor Sekelj, Andreo Szabó kaj Vilmos Benczik, kiu lasta gajnis ankaŭ la pokalon Harabaĝiu por "Nova Talento". La publiko kaptis la okazon aplaŭdi ankaŭ la "Aŭtoron de la Jaro", Lajos Tárkony, kaj la kontrastan figuron de Aŝvinikumar', unuapremiito (pokalo Ivo Lapenna) en la Oratoraj Konkursoj.

Restis nur la kutimaj dankoj al ĉiuj aŭtoritatoj kaj laborintoj kaj la invito de prof. Kohen-Cedek al la 52-a en Tel Aviv, sub alta protekto de la ŝtatprezidanto. Per lia solena transpreno de la kongresa flago el la manoj de LKK-prezidanto Berceli kaj la martelbato de la prezidanto forsonis la lastaj (oficialaj) momentoj de la Kongreso.

La 51-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Budapest de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1966 en la ĉeesto de 4010 reprezentantoj el 42 landoj unuanime akceptis la sekvantajn rezoluciojn:

REZOLUCIO I

Adresita al Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj Ŝtatoj-Membroj

La Kongreso

1. **NOTAS** kun kontento, ke Universala Esperanto-Asocio, la landaj kaj fakaj organizaĵoj apartenantaj al ĝi kaj ĝia tuta membraro en 85 landoj efike plenumis la ampleksan Laborplanon de UEA por la Jaro de Internacia Kunlaboro; ke rezulte de tiu multflanka agado sur la internacia kaj nacia niveloj "almenaŭ 50 milionoj da personoj estis en tiu aŭ alia formo objektive informitaj pri la JIK kaj pri la ĉefaj aspektoj de la laboro de Unuiĝintaj Nacioj" (Dok.I/VII/5 de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono); ke per tiu rimarkinda kontribuo al la celoj de la JIK la Esperanto-Movado, organizita en la politike neŭtrala Universala Esperanto-Asocio, ankoraŭfoje manifestis sian firman apogon al ĉiuj sinceraj klopodoj celantaj dispeli internaciajn tensiojn, kaj sian fidon je la idealoj de interpopola kompreniĝo, internacia kunlaborado kaj monda paco;

2. **KONSTATAS,** ke en la nuna epoko de giganta teknika progreso kaj ĉiurilata interdependeco de la diversaj mondopartoj, kiam la internaciaj kontaktoj ĉesis esti privilegio de malmultaj kaj fariĝis rajto de la vastaj popolamasoj, la lingvodiverseco transformiĝis el simpla ĝeno por kelkaj en gravan internacian problemon por ĉiuj; ke en tiaj kondiĉoj la lingvaj baroj prezentiĝas kiel la ĉefa obstaklo al adekvata internacia komunikado sur ĉiuj kampoj, inkluzive la personajn rilatojn de ordinaraj homoj, kio siavice malhelpas aŭ eĉ malebligas la plenan utiligon de sciencaj atingoj, la ampleksigon de kulturaj interŝanĝoj kaj la pluan evoluigon de internacia kompreniĝo;

3. **MEMORIGAS** pri la fakto, ke la lernado de diversaj fremdaj lingvoj — malgraŭ la grandaj fortostreĉoj, tempo kaj materiaj rimedoj dediĉitaj al tiu celo — donas nur tre modestajn rezultojn (kutime eĉ ne pasivan lingvoscion) kaj en ĉiu okazo neniel sukcesis solvi la kompleksan kaj daŭre akriĝantan lingvan problemon en ĝia tuteco, nome en ĉiuj sferoj de la nuntempa internacia vivo en kadroj ne regionaj, sed mondaj;

4. **OPINIAS,** ke la sistemo de oficialaj kaj t.n. laboraj lingvoj — ĉiam pli multnombraj kaj ne ĉiam la samaj — en diversaj registaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj ne nur ne solvas kontentige la demandon, eĉ por la limigitaj bezonoj de la koncernaj organizaĵoj, sed ankaŭ kontraŭas la principon de egaleco de ĉiuj nacioj, grandaj kaj malgrandaj, kaj efektive signifas lingvan diskriminacion, kiu, simile al ĉiu alia formo de diskriminacio, ja donas provizorajn privilegiojn al unuj je malavantaĝo de aliaj, unuavice de la malgrandaj nacioj, sed en la lasta konsekvenco malutilas same tiel al la privilegiitoj, kiel al la viktimoj de la diskriminacio;

5. **ESPRIMAS** la konvinkon, ke la adopto de la Internacia Lingvo (Esperanto) — neŭtrala, facila, vere internacia laŭ siaj konsistaj ĝelementoj kaj ĉiuflanke elprovita en multjara praktiko kiel nuancita kaj absolute taŭga instrumento de internacia komunikado — respondas al la bezonoj de la moderna homo en la kosma erao kaj tiel prezentas la sole racian, justan kaj radikalan solvon de tiu ĉi problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj: pure teknike-lingva, psikologia, socia, ekonomia kaj politika;

6. **ALTIRAS** la atenton al la fakto, ke okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro preskaŭ unu miliono da individuaj personoj, inter kiuj multaj elstaraj personecoj de la publika vivo de diversaj landoj, kaj preskaŭ 4000 organizaĵoj kun entute pli ol 60 milionoj da membroj subskribis Proponon, "ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj";

KAJ TIAL, en la intereso de egaleco, justeco kaj progreso:

(a) **petas** la Ĝeneralan Sekretarion de UN entrepreni la necesajn paŝojn por doni sekvon al la Propono kaj la Registarojn de la Ŝtatoj-Membroj apogi ĝian progresivan realigon;

(b) **alvokas** la registarojn kaj la kompetentajn edukajn instancojn de ĉiuj nacioj, sed unuavice de tiuj, kies lingvoj ne ĝuas privilegian pozicion en la internaciaj rilatoj, laŭgrade enkonduki aŭ vastigi la instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejoj, eventuale surbaze de internacia konvencio por garantii paralelan kaj ĉiam pli ampleksan uzadon de la lingvo en la reciprokaj rilatoj de la koncernaj popoloj, kaj, en posta stadio, ankaŭ en la rilatoj de tiuj popoloj kun la grandaj nacioj.

REZOLUCIO II

Propono al UN
Direktita al la subskribintoj de la

La Kongreso

1. **ScIIĜIS** kun plezuro, ke la Propono al Unuiĝintaj Nacioj por solvo de la lingva problemo per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo (Esperanto) subskribis entute 874 765* individuaj personoj, inter kiuj 106 ŝtatestroj kaj membroj de registaroj, 1 267 parlamentanoj, 937 lingvistoj kaj filologoj, 6 357 Nobelpremiitoj, membroj de sciencaj akademioj, institutoj kaj profesoroj de universitatoj, 6 051 verkistoj, artistoj kaj ĵurnalistoj, 49 740 instruistoj, 55 890 apartenantoj de liberaj profesioj, 265 000 studentoj, 489 417 oficistoj, laboristoj kaj farmistoj, k.a., kiel ankaŭ 3 709 organizaĵoj kun entute 63 milionoj da membroj, kaj esprimas al la subskribintoj sian dankon pro la klarvida ago;

2. **INFORMAS** la subskribintojn, ke en oktobro 1966, Universala Esperanto-Asocio transdonos la Proponon al la Ĝenerala Sekretario de UN kaj sendos kopion de la koncerna dokumento al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj;

3. **INVITAS** ĉiujn organizaĵojn, precipe tiujn, kiuj subskribis la Proponon, malfermi kursojn de la Internacia Lingvo por siaj membroj kaj tiamaniere ebligi al ili jam nun senperajn internaciajn kontaktojn, kaj petas la Esperanto-societojn, unuavice tiujn de geinstruistoj, doni tiucele sian helpon.

REZOLUCIO III

Utiligo de Esperanto por fakaj celoj

La Kongreso aprobas la konkludojn de la Unua Ĝenerala Kunveno "Esperanto en la Fakoj", kiu unuanime akceptis la raporton de la estrarano pri Landaj kaj Fakaj Asocioj, s-ro M. Jaumotte, kaj rekomendas al ĉiuj koncernatoj, precipe al la Fakaj Organizaĵoj, agi konforme.

REZOLUCIO IV

Esperanto en la lernejoj

La Kongreso kun danko ricevis la raporton pri la laboro de la Dua Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, okazinta en Graz de la 23-a ĝis la 29-a de julio; esprimas siajn gratulojn al ĉiuj geinstruistoj, kiuj sindone laboras sur tiu kampo; kaj rekomendas al la kompetentaj instancoj de UEA kaj al ĉiuj aliaj koncernatoj plenumi la decidojn de tiu Konferenco en la intereso de plua vastigo de la Esperanto-instruado en la lernejoj.**

---

* La ciferoj donitaj en la Rezolucio II estas tiuj de kelkaj tagoj antaŭ la Universala Kongreso. La definitivaj ciferoj prezentotaj al Unuiĝintaj Nacioj estas jenaj:

1.	Ŝtatestroj kaj Membroj de Registaroj de suverenaj ŝtatoj	114
2.	Parlamentanoj	1 357
3.	Lingvistoj kaj filologoj	993
4.	Aliaj membroj de sciencaj akademioj, institutoj, sciencaj esplorcentroj, profesoroj, docentoj kaj asistentoj en universitatoj	6 879
5.	Instruistoj en mezgradaj, teknikaj, elementaj kaj aliaj lernejoj	51 674
6.	Verkistoj, artistoj kaj ĵurnalistoj..	6 620
7.	Aliaj liberaj profesioj (kuracistoj, advokatoj, komercistoj, industriistoj, ktp)	58 793
8.	Studentoj kaj lernantoj	273 517
9.	Oficistoj (ŝtataj kaj privataj) kaj laboristoj	366 214
10.	Farmistoj, farmlaborantoj kaj kamparanoj	27 446
11.	Dommastrinoj	58 839
12.	Aliaj	60 017
Individuoj entute (el 74 landoj) :		**912 463**

Organizaĵoj: 3832 kun 70 329 000 membroj.

** La decidoj aperos en la oktobra "Esperanto".

CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
77, Grasmère Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono ARNold 9081

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ 1965/1966

(Unua listo)

Ekde sia fondiĝo en 1952 CED ĉiam dediĉis grandan atenton al la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj. Ĝi faris plurajn enketojn kaj publikigis siajn rezultojn. La lasta enketo rilatis al la lerneja jaro 1962/1963, kaj la rezulto estis, ke en tiu lerneja jaro la lingvo estis instruata en 563 lernejoj de 32 landoj al 16 272 gelernantoj.

Kiel komunikite en la rubriko de CED en la decembra numero de "Esperanto", 1965, la enketon por la jaro 1965/1966 entreprenis s-ro O. Olsson el Lund en la nomo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kaj CED donis al li sian apogon. Kvankam s-ro Olsson faris sian laboron tre konscience, tamen multaj lernejoj ne respondis ĝis nun al liaj demandoj. Efektive, laŭ la ĝis nun ricevitaj respondoj, Esperanto estis instruata en 1965/1966 nur en 316 lernejoj de 23 landoj al entute 9 398 gelernantoj. Estas pli ol evidente, ke tiu statistiko estas tre manka. El 32 landoj, kiuj troviĝis en la statistiko por 1962/1963, 9 landoj tute ne respondis. Ili estas: Grekujo, Irlando, Kanado, Norvegujo, Portoriko, Rumanujo, Soveta Unio, Svislando kaj Urugvajo. El aliaj landoj, unuavice el Pollando kaj Jugoslavio, la respondoj estas tiel nekompletaj, ke nur eta frakcio de lernejoj troviĝas en la suba listo. En tiaj kondiĉoj estas absolute maleble por CED publikigi en la nuna momento statistikon pri la Esperanto-instruado en lernejoj en 1965/1966. Sube ni publikigas la liston de ĉiuj lernejoj, pri kiuj s-ro Olsson ricevis la petitajn informojn. Estas ellasitaj nur la lernejoj en Britujo, Bulgarujo kaj Francujo, ĉar la informoj pri la lernejoj en tiuj landoj estas verŝajne kompletaj. CED varme petas la landajn asociojn, la sekciojn de ILEI kaj precipe la geinstruistojn, kiuj instruas Esperanton en la lernejoj, **kontroli atente, ĉu iliaj lernejoj troviĝas en la suba listo. Se ne, ili bonvolu tuj kontakti s-ron O. Olsson, Bantorget 3, Lund, Svedujo kaj komuniki al li ĉiujn petitajn detalojn. Nur tiamaniere s-ro Olsson povos kompletigi la nunan tre mankan liston kaj CED povos publikigi fidindan dokumenton, kiu objektive respegulos la nunan staton de instruado de Esperanto en la lernejoj.**

Unua Listo

Argentino: Rafaela - S.Fe, 1. Normala Lernejo No. 4; 2. Dgo de Oro; 3. Dgo de Oro (2 kursoj).

Aŭstralio: 1 - 4. Morwell, Morwell High School (4 kursoj).

Aŭstrujo: 1. Innsbruck, Universitato; 2. Graz, Erzherzog Johann Hauptschule; 3. Linz, Gewerbliche Berufsschule.

Belgujo: 1. Eeklo, Ateneo; 2. Maaseik, Kolegio de la Sankta Kruco; 3. Waremme, Athénée Royal; 4 - 5 Verviers, Athénée Royal (2 kursoj).

Brazilo: 1. Fortaleza, Ceará, Esperanto-kurso de la Universitato de Ceará.

Britujo: Entute 34 lernejoj, pri kiuj estas donitaj precizaj informoj. La listo verŝajne estas kompleta.

Bulgarujo: Entute 120 lernejoj, pri kiuj estas donitaj precizaj informoj. La listo verŝajne estas kompleta.

Ĉeĥoslovakio: 1. Přibor, Zakladni devililetá škola.

Danujo: 1. Kopenhago, Vibenshus Skole; 2. Kopenhago, Randersgades skole; 3. Kopenhago, Østrigsgades skole; 4. Skrave, Skrave skole.

Finnlando: 7. Tammela, Letkun Koulu; 2. Turku, Rauvolan Kansakoulu; 3. Turku, "Aurala"-opisto instituto; 4. Turku, Laborista Instituto.

Francujo: Entute 69 lernejoj, pri kiuj estas donitaj precizaj informoj. La listo verŝajne estas kompleta.

Germanujo, Okc.: 1. Bad Kissingen, Städt. Volkshochschule; 2. Bensheim, Liebfrauenschule; 3. Dachau, Jugendheim; 4. Hildesheim, Volksschule K III; 5. Homburg, Saar, Volkshochschule; 6. Ilbeshausen, Volksschule; 7. Selm, Reallernejo.

Germanujo, Or.: 1. Neuruppin, "Lernejo de l'paco".

Hispanujo: 1. Gandia, Colegio-Academia Cervantes; 2. Málaga, Institución Sindical de Formación Profesional "Francisco Franco".

Hungarujo: 1. - 2. Hodmezövásárhely, Kossuth Zsussanna Szakközépiskola (2 kursoj); 3. Hodmezövásárhely, Szántó Kovács János; 4. Miskolc, Zrinyi Ilona Gimnazium; 5. Miskolc, Földes Ferenc; 6. Mórahalom, Ĝenerala gimnazio; 7. Sárospatak, Rákóczi gimnázium; 8. Szeged, Fervoja Teknika Lernejo; 9. Szeged, Ságvári Endre; 10. Szeged, Ságvári E. Egytemi Gyak. Gimnázium; 11. Budapest, "I. István"-Teknikumo.

Italujo: 1. Albano Laziale, Scuola Media "Giovanni Pascoli"; 2. Bologna, "Guido Reni"; 3. Bologna, Scienca Liceo "E. Fermi"; 4. Bologna, Porinstruista lernejo "Albini"; 5. Catania/Giarre, Ŝtata Sciencliceo; 6. Catania/Giarre, Supera lernejo por sociaj helpantoj; 7. Catania/Giarre, Gioventu Italiana; 8. Catania/Giarre,

Ŝtata Instituto por librotenistoj; 9, 10, 12. Massa centro, Vittorio Alfieri (3 kursoj); 11. Massa centro, Instituto Professionale di stato; 13. Massa centro, "Liceo Pellegrino Rossi"; 14. Istituto Professionale Statale di Poggioletto; 15. Ragusa, Nacia Kultura Inst. por Laboristoj; 16. Roma, Istituto Tegnico Comm. Statale "L. Einaudi"; 17-18. Vittoria, Supera lernejo por Sociaj Helpantoj (2 kursoj).

Japanujo: 1. Hukuoka, Komerca gimnazio; 2. Kure-si, Miyahara-Kookoo; 3. Osaka, Ikuna-Altlernejo; 4. Takaoka, Takaoka Zyosi Kôkô; 5. Tokio, Tôhô Kôkô k. Ĉugakkô.

Jugoslavio: 1. Borovo, Obućarsko-gumarska teknička škola; 2. Kalinoac, SRH, Grgur Karlovčan; 3. Kumanovo, Gimnazio "Goce Delĉev"; 4. Nova Gradiška, 1 Osnovna škola.

Nederlando: 1. Didam, Publika Lernejo; 2. Leiden, Prinses Marijke school; 3. Rotterdam, Kalvina Seminario por Instruistoj.

Nov-Zelando: 1. Auckland, Murrays Bay Intermediate; 2. Dunedin, Dunedin North Intermediate; 3. Dunedin, Queen's High School.

Pollando: 1. Gdynia, Szkola Podstawowa Nr 29; 2 - 5. Kraków, IV General-kleriga Liceo (4 kursoj); 6. Kraków, Jagiellona Universitato; 7. Kraków, Supera Pedagogia Altlernejo.

Svedujo: Lund, Värfruskolan;

Usono: 1. Collegeville, Ursinus College; 2. Ithaca, De Witt Mezlernejo; 3. Ithaca, De Witt High School; 4. San Mateo, Calif., Turnbull School; 5. San Mateo, Calif., Lakeshore School; 6. Springville, Utah, Springville Junior High School.

KATEDROJ KAJ LEKTORATOJ DE ESPERANTO

CED entreprenis enketon pri ĉiuj katedroj, lektoratoj kaj kursoj en la universitatoj kaj samrangaj altlernejoj. Bedaŭrinde ankaŭ tiu ĉi enketo ne povis esti ĝustatempe finita, ĉar tro multaj ne respondis. Prof. J. Régulo-Pérez, kiu faras por CED la enketon, ricevis ĝis nun la petitajn informojn pri la sekvantaj universitatoj aŭ altlernejoj, en kiuj troviĝas katedroj aŭ lektoratoj de la Internacia Lingvo:

Argentino: Filozofia fakultato de la Universitato en Rosario.

Brazilo: Universitato de Ceará en Fortalezo; Filozofia Fakultato de Pontifika Katolika Universitato en Pôrto Alegre.

Britujo: Universitato de Liverpool.

Bulgarujo: Filologia Fakultato de la Universitato en Sofia; Supera Financa kaj Ekonomia Instituto en Sviŝtov; Supera Instituto por Meĥanikigo ktp. en Ruse; Supera Ekonomia Instituto en Varna kaj Maŝinelektra Instituto en Varna.

Germanujo: Universitato de Hamburgo.

Hispanujo: Katedro en la Universitato de La Laguna.

Hungarujo: Universitato de Szeged.

Nederlando: Urba Universitato de Amsterdam.

Pollando: Universitato de Kraków; Supera Pedagogia Altlernejo en Kraków.

Rumanujo: Politekniko de Bukareŝto.

Usono: Universitato de Kalifornio en Berkeley; Drake-Kolegio de Florido; Elizabethtown-Kolegio en Elizabethtown.

Urugvajo: Instituto de Superaj Studoj en Montevideo.

Mankas informoj pri tuta aro da aliaj universitatoj, ekzemple Innsbruck kaj Wien en Aŭstrujo; Ĉengdu, Hiamen, Pekino k.a. en Ĉinujo; Budapest en Hungarujo; Zagreb en Jugoslavio; Pjengjang kaj Taegu en Koreujo; Wellington en Nov-Zelando; Lublin kaj Wrocław en Pollando ktp. CED insiste petas la docentojn kaj lektorojn en tiuj kaj en aliaj universitatoj, en kiuj ekzistas katedroj aŭ lektoratoj de Esperanto, **tuj komuniki la detalojn al prof. J. Régulo-Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, Hispanujo.** La afero estas vere grava. La lasta limdato estas la 30-a de novembro, 1966.

Donacoj por CED	£	ŝ	p
La stato en majo 1966	£ 44	11	8
S-ro K. Mc Lennan, Britujo		17	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5	0	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5	0	0
S-ino Doris M. Worcester, Britujo	4	0	0
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio	5	0	0
S-ro G. Korth, Germanujo	0	10	10
S-ro E. F. Dean, Britujo	5	0	0
S-ino M. Duncan, Aŭstralio	5	0	0
La stato je la 25 de junio 1966	£ 74	19	6

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Apartan dankon al tiuj donacintoj, kiuj regule financ helpas al CED. Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

APERIS NOVA ELDONO

de la 6-lingva (angla, franca, germana, hispana, japana, rusa) 10-paĝa faldfolio por informado en universitataj medioj.

Trafa, serioza enhavo.
Subskriboj de 75 profesoroj en 27 landoj.

Prezo: po 0,07 gld.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA.

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la julian eldonon.

RADIO SOFIA daŭrigas siajn elsendojn ĉiudimanĉe je la sama horo, sed nun per la jenaj ondlongoj: de 20.05 ĝis 20.30 per 50,62 m (5920 kcs), de 23.30 ĝis 23.55 per 49,42 m (6070 kcs) kaj 31,38 m (9560 kcs). En la disaŭdigoj vi povas aŭdi novaĵojn, komentariojn pri enlandaj kaj internaciaj problemoj, raportaĵojn kaj prelegojn pri la ekonomia kaj kultura vivo en Bulgarujo, bulgaran popolmuzikon, la rubrikon "Poŝtkesto". Viajn demandojn, opiniojn kaj sugestojn bonvolu sendi al: Radio Sofia, Disaŭdigoj en Esperanto, Sofia, Bulgarujo.

RADIO PRAHA. 2-IX, Esperantistoj en la sudbohemia regiono: 16-IX, Parolas niaj aŭskultantoj; 30-IX, Pri ĉeĥoslovaka lernejsistemo.

RADIO PEKINO daŭre elsendas je la samaj tagoj kaj horoj, sed ondlongoj ŝanĝiĝis: programo direktata al Eŭropo vendrede kaj sabate de 20.00 ĝis 20.30 per ondoj 42 m, 39 m, 38 m, 32 m, 30 m; programo direktata al Japanujo kaj Koreujo sabate kaj dimanĉe de 11.00 ĝis 11.30 per ondoj 47 m, 42 m; programo direktata al sudorienta Azio sabate kaj dimanĉe de 12.30 ĝis 13.00 per ondoj 25 m, 19 m. Pli preciza informo pri la uzataj ondlongoj kaj frekvencoj ne estas diskonigata de la stacio.

NEKROLOGOJ

JAIME IRANZO NAVARRO
Jaime Iranzo-Navarro, VD kaj FD de UEA en Bilbao, Hispanujo, mortis la 6-an de majo, 80-jara.

HENRI MICARD
Mortis s-ro Henri Micard, fondinto kaj eksprezidanto de la Kulturdomo Grésillon, Francujo. Li estis delegito de UEA jam de 1937.

MAJKEN JÖRGENSEN
La 26-an de junio forpasis en Bergen, Norvegujo, la delegito de UEA, s-ino M. Jörgensen.

EDWARDA KAMINSKA
En majo subite forpasis en Nederlando s-ino E. Kaminska, delegitino de UEA en Gdańsk de 1947.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Esperantomarŝo/Sub la verda standardo de Jac. Feitsma/Jo Sodamo. Ludas Reĝa Nederlanda Milita Orkestro. Eld. N.V. Grammofoonplatenmaatschappij CNR, Scheveningen, Nederlando. Disko 45 r/m., 17,5 cm. Kovrila teksto en Esperanto. 4,25 gld.*

44a Foiro de Padova, 31 majo-13 junio 1966. Eld. Foiro de Padova, Via N. Tommaseo 59, Padova, Italujo. Senpaga faldfolio.

Balaton. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 64 p. 15 x 11 cm. Fotolibro, bind.

Hungario, vojaĝlibro de Gyula Németh. Eld. Pannonia, Budapest, 1965. 187 p,. 16 x 11 cm., il.

Vuk, bestromano de István Fekete. El la hungara: Margit Leszkó. Il. Pál Csergezán. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 82 p. 18 x 12 cm., bind.

Hungario sur bildoj. Eld. Corvina, Budapest, 1965. 147 p. 28 x 20 cm. Fotolibro, tolbind.

Polaj okcidentaj kaj nordaj teritorioj, de T. Derlatka kaj J. Lubojański, Okcidenta Pres-Agentejo, Warszawa, 1966. 154 + 36 p., 20 x 13 cm., il. (Alia ol samtitola libro de ĉ. 1958).*

Poznań, urbo de foiroj kaj internaciaj kontaktoj. Eld. PEA, Poznań, 1966. 48 p. 20 x 15 cm. Dulingva eldono pola-Esperanta.

Universala skribo, de Manuel Halvelik. Eld. la aŭtoro, Belgujo, 1966. 128 p. 21 x 15 cm., ofsetita. 7,— gld.*

Festaj semajnoj de Szeged, 23 jul.-20 aŭg. 1966. Eld. Fremdultrafika Oficejo. 28 p. 19 x 10 cm.

Mi amis junulinon, de Walter Trobisch. Konfidenca korespondado. Eld. Editions Trobisch, Baden-Baden, 1966. 140 p. 18 x 12 cm. Bd. 7,20; br. 5,40 gld.*

Fundamentele feiten over de internationale taal Esperanto. Eld. Federacio de Esperanto-organizaĵoj en Nederlando. 22 p. 21 x 15 cm. (Nederlanda eldono de dok. CED/7).*

Bohuslän, suna somerparadizo. Eld. Göteborgs och Bohus Läns Turisttrafikförbund, Drottningtorget, Göteborg, Svedujo. Senpaga kolora turisma faldfolio.

Utilaj sciindaĵoj pri Hungarujo. Eld. Landa Fremdultrafika Oficejo, Budapest VIII., Múzeum utca 11. 47 p. 20 x 14 cm., il. Senpaga?

Kiel statas la nuntempa tekniko? Eld. KGM MTTI Prospektustár, Budapest, V., Október 6 u. 21, Hungarujo. Senpaga kolora faldfolio.

Dunaújváros. Eld. Idegenforgalmi Hivatal, Dunaújváros, Korányi Sándor u. l, Hungarujo. Senpaga faldfolio turisma.

Jihlava. Eld. Městský národní výbor, komise cestovního ruchu, Jihlava, Ĉeĥoslovakio. Senpaga turisma faldfolio.

Donacon el Budapeŝto. Komerca faldfolio.

Direktivoj de la XXIII Kongreso de KPSU. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo, 1966. 73 p. 21 x 15 cm.

Dudek horoj, kroniko de Ferenc Sánta. El la hungara tr. div. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 234 p. 16 x 9 cm., plaste bind.

Ĉu ankaŭ vi scias? de Éva Janikovszky. El la hungara: Sándor Szathmári. Koloril. László Réber. Eld. Corvina, Budapest, 1966. 40 p. 23 x 20 cm., bind. Legolibro por junaj infanoj.

Sankta Meso. Eld. Ekumena Esperanto, Svisujo, 1966. 28 p. 21 x 15 cm., ofsetita. Liturgiaj tekstoj kaj kantoj. 0,85 gld.*

Rakontu, samideano. 20 aŭtoroj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, 1966. 69 p. 21 x 15 cm. 4,50 gld.*

La ĉeĥoslovakaj esperantistoj salutas la 51-an Universalan Kongreson en Budapeŝto. 11 p. 30 x 21 cm., il.

La plej bona el la plej bonaj de Hungarujo. Eld. Presto, Budapest. Faldfolio il. pri manĝaĵoj.

Foiro Budapest 19-29.5.1967. Plurlingva faldfolio senpaga ĉe IBUSZ, Budapest V., Felszabadulás tér 5, Hungarujo.

Vi estas kore invitita al la 52-a U.K. Senpaga faldfolio, eld. Peltours, Tel Aviv, str. Aĥad Haam 28, Israelo.

Flugu per MALÉV al Budapest. Eld. MALÉV, Budapest, V., Váci utca 1, Hungarujo. Senpaga faldfolio kolora.

Pionirfervojo en Budapest. Il. faldfolio.

La akvo kaj la homo en Hungarlando. Eld. Kontoro por Akvoafera Teknika Informado, Budapest, 1966. 48 p. 20 x 14 cm., il.

Generalaj terminoj de neorganikaj kaj organikaj kombinaĵoj, de Jan Pióro. Eld. la aŭtoro, ul. Reja 3/19, Piastów (Warszawa), Pollando. 1966. 8 p. 15 x 21 cm., hektografita.

Certe triumfos la popolo de Vjetnamio! La tria kajero. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 60 p. 26 x 23 cm. Foto-kajero. 0,40 gld.*

Skövde, Skaraborg. Eld. Fritidsstyrelsen, Skövde, Svedujo. Senpaga kolora turisma prospekto.

Por socialisma vivmedio - Ostrava 66. Eld. Ekspozicio "Ostrava 66", Černá Louka, Ĉeĥoslovakio. Senpaga komerca faldfolio.

Indekso de semoj. Eld. Botanika Ĝardeno de Veterinara Universitato, Palackého 1-3, Brno 12, Ĉeĥoslovakio. 1966. 23 p. 21 x 10 cm.

Paroladoj ĉe la literatura kaj arta kunsido en Jan-An, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. Dua eldono. 55 p. 15 x 10 cm.

Haute-Saône. Eld. Syndicat d'Initiative, F-70-Gray, Francujo. Senpaga turisma prospekto.

Kvin virinoj de amoro, de Ihara saikaku. El la japana tr. Miyamoto M. Serio Oriento-Okcidento n-ro 7. Eld. Pirato, Oosaka, 1966. 159 p. 21 x 15 cm., kun 42 ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.*

Žilina. Eld. Reštaurácie, podnikové riadtel'stvo, odd. org. prevádzky, Žilina, Ĉeĥoslovakujo. Nacilingva turisma broŝuro kun aldono en Esperanto.

44a Germana Esperanto-Kongreso (Kongresa Libro). 1966. 28 p. 17 x 24 cm., il.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

stato je la 26-a de julio

KONKURSO I

Lando		kvoto	poentoj	%
1.	Hispanujo	2860	3170	110,84
2.	Belgujo	2055	1960	95,38
3. (4)	Britujo	6691	6191	92,53
4. (3)	Usono	4526	4080	90,15
5.	Svedujo	7180	6375	88,79
6.	Francujo	7752	6851	88,34
7.	Danlando	3099	2635	85,03
8.	Italujo	4253	3355	78,89
9.	Finnlando	3160	2470	78,16
10.	Svislando	2459	1855	75,44
11.	Nederlando	5975	4053	67,83
12. (13)	Brazilo	4142	2702	65,23
13. (12)	Germanujo	7221	4545	62,94
14. (15)	Jugoslavio	5560	3390	60,97
15. (14)	Japanujo	3965	2290	57,76

KONKURSO II

1.	Kanado	842	1094	129,93
2.	Israelo	460	540	117,39
3.	Grekujo	270	266	98,52
4.	Sudafriko	250	240	96,—
5.	Aŭstralio	1475	1365	92,54
6.	Aŭstrujo	1475	1270	86,10
7.	Novzelando	1481	1165	78,66
8.	Argentino	905	580	64,09
9.	Islando	250	155	62,—
10.	Norvegujo	1755	975	55,56
11.	Madagaskaro	250	30	12,—

(Vidu la regulojn sur paĝo 39. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

KOREKTOJ JARLIBRO 1966/I

Paĝo 32. En la listo Landaj Informaj Fakoj oni bv. aldoni: Franca: S-ro André Bourdeaux, 164 rue de Saussure, F-75-Paris (17e).

Paĝo 196. En la mezo de la paĝo la D: S-ro Raymond Paulus apartenas sub Charleroi.

DELEGITOJ

Brazilo

Belém (Pará): 400.000 D: Euclides Caripuna Soares, Av. Almirante Tamandaré 979.

Volta Redonda D: Antonio de Souza Barbosa. Rua 42 no. 41; tel. 2491.

Ĉeĥoslovakio

Český Dub (okres Liberec) 2500 D: D-ro Josef Hradil, N-ro 137/III.
FD: (Medicino) La D.

Litomyšl D: Vítězslav Beníček, Jiráskovo nám.4.

Plzeň FD (Trafiko urba): Ladislav Svoboda, Plzeň — Slovany Jasanová 10.

Francujo

Strasbourg D: Fernand Knecht, 67-Entzheim, Station Météorologique; tel. 36.93.82.
FD: (Meteorologio): La D.

Hungarujo

Csopak (Dep. Veszprém) 1500 D: Sándor Szalay, Hóvirág utca 1 (de aprilo ĝis oktobro).

Kanado

Ottawa FD (religio: Anglikanismo): Kirk Crockett, 68 MacNaughton Avenue, Ottawa 1, Ontario; tel. 235-3060.

Quebec FD (Edukado): F-ino Florence Côté, 1370 Frontenac, Quebec 6; tel. 681-1654.

Waterloo (Ontario) 28.000 FD (Junularo): George Moore, 272 Erb St. E.; tel. 74-38111.

Kenjo.

Eldoret D: Vakas.
FD: (Orient-afrikaj Lingvoj): vakas.
FD (Religio: Evangelia Kristanismo): vakas.

Nederlando

Goudriaan 650 D: F-ino Helmi Veldhuijzen, No. 79.

Novzelando

Auckland FD (Politiko): Michael Lawrence McNamara, 25 Dexter Avenue, Mt. Eden.

Sovetunio

Aŝhabad (Turkmenistan) 250.000 FD (lingvisti-ko): Aleksandr Duličenko, Aŝhabad-Centr, abon.ja.25.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Benns, F-ino W. Joan, Britujo; Christensen, s-ino A., Danlando; Côté, F-ino Florence, Kanado; Rytjkov, s-ro N.; Watson, S-ino E., Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

346 Grahovac, s-ro I., Aŭstralio; 347. Barbosa, s-ro Ant. de Souza, 348 Lima, s-ro Alvaro H., 349 Varanda, s-ro José, Brazilo; 350 Lyes, s-ro N. A. H., Britujo; 351 Maczkowski, s-ro A., Francujo; 352 Stahl, s-ro C. D., Germanujo; 353 Viti, s-ro G., Italujo; 354 Osibov, s-ro I., Jugoslavio; 355 Ekman, s-ro (Karl Gustav) Arne, Svedujo.

MEMBRO-SUBTENANTO 1965

370 Knoedt, s-ro L. H., Brazilo.

FONDAĴO CANUTO

Britujo: Boulton, F-ino M.: 2 MA, 1 MJ.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Aŭstrujo: Rentmeister, s-ro F., 3,75. Belgujo: Demesmaeker, s-ro L., 19,55; Verstraeten, s-ro J., 7,27; Vyncke, s-ro R., 10,—. Britujo: McLennan, S-ro K., 20,—; NN, 200,—. Danlando: s-ro E. S., 18,05. Hispanujo: Purull, s-ro D., 4,80. Nederlando: v. d. Beek Kelly, s-ino A. C. H., 500,—; Bossong, s-ro R. H. 10,—. Svedujo: Nilsson, s-ino Amy, 7,—.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO (Gld.)

Kuvajto: Isaac, s-ro N., 100,— (Amikoj de Hindujo). Svedujo: Edler, s-ro P., 14,—.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Britujo: Lapenna, Prof. D-ro I., 100,—; Laurie, S-ino E., 50,—. Germanujo: Wagner, S-ro H., 9,—. Kanado: Henderson, s-ro D. C., 3600,—. Nederlando: Moerbeek, s-ro R. 100,—; Sadler, s-ro V., 100,—. Svedujo: Carlén, s-ro E., 699,27.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Niaj membroj deziras interŝanĝi bildpoŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Sendu multnombre. Respondo garantiata. E-Rondo, 68 McNaughton Avenue, Ottawa 1, Kanado.

F-ino Maria Preslavska loĝas nun en str. "Stanke Dimitrov" Nr. 30, bl. "Edison" vh. A II et., Ruse, Bulgarujo.

Kapabloj kaj talentoj, kiujn oni ne posedas, estas akireblaj nur pere de ekzercado. Ĉu do povas esti, ke **kunnaskitaj** kapabloj kaj talentoj estas akiritaj laŭ sama maniero — eventuale en antaŭaj vivoj? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariensdalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Por Vojaĝanta Esperanto-Ekspozicio, ni bezonas fotojn de gekursanoj kaj aliajn materialojn. Reciproke. Slobodan Ješić, Chicago, Ill. 60622, 1933 W. Schiller, U.S.A.

Unuopajn Kolorpozitivojn pri esperantistaj aranĝoj kaj esperantaĵoj ni bezonas urĝe, por kompletigi nian varbparoladon per diapozitivoj. Se vi sendos, indiku prezon kaj sendelspezojn. Anticipe koran dankon. Esperanto-Servo Ternitz, A 2633 Ternitz, Postf.12, Aŭstrujo.

Por pruvi al mia onklino disvastigadon de Esperanto, mi petas ĉiujn sendi p.k. al Zilda Sartorato Gomes, CP 4081 ZC 05, Rio de Janeiro, Brazilo.

Sud-Afriko, plej alloga, turista lando meritas viziton. Aervojaĝo povus enteni vizitojn al pliaj Eŭropaj urboj, ankaŭ Tel-Aviv! Revenvojaĝkosto 2662 ned.gld. Pliajn informojn, je respondkupono, donos: Informo, Silverton, Transvaal, Sud-Afriko.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Librotenist(in)o serĉata en la Centra Oficejo de U.E.A.

Estas loko por lerta oficist(in)o, bone reganta Esperanton parole kaj skribe, kun kompetenteco pri librotenado, konanta trakopian librotenan sistemon per maŝino.

Leteroj kun informoj pri instruiteco, antaŭaj oficoj, aĝo, rekomendoj, dezirata salajro ktp al la Direktorino de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

En 1967 reaperos

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

FERVOJA TERMINARETO

germana/esperanta - esperanta/germana

de Gernot Ritterspach
Gvidanto de la Terminara Komisiono de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
80 paĝoj; 11,4 x 16,2 cm 2 000 terminoj

Eldonis:
Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mendu ĉe: S-ino Elisabeth Ritterspach, 607 Langen, Berliner Allee 1, Germanio
Poŝtĉekkonto 2765 31 Frankfurt
Prezo: 6,50 DM + 10 % por afranko

Oni skribis pri

KAŬKAZAJ RAKONTOJ

"Ĉi tiuj rakontoj estas ĝuo por la amatoroj de streĉaj aventuroj, sed ankaŭ de bela prozo, ĉar Lermontov, giganto de la rusa poezio, estas ankaŭ majstro de la prozo, kaj feliĉe la traduko de D. Staritsky estas ne nur fidela, sed ankaŭ vigla kaj bonstila."

Michel Duc-Goninaz en Heroldo

"Kvankam la rakonto estas strikta, dinamika kaj tute ne enuiga, oni bezonas trankvilan horon, se oni veri volas ĝui ĝin en ĉiuj nuancoj. Kaj tio, ŝajnas al mi, estas signo, ke temas pri 'klasikaĵo'."

Stefan Maul en Germana Esperanto-Revuo

"Turnante la lastan paĝon oni pensas bedaŭre: 'ha! jam finita!', kio estas laŭ mi la plej bona — kaj por esperantlingva verko malofta — komplimento."

G. L. en SAT-Amikaro

Prezo (kun alloga moderna bindaĵo): 5,— gld.

EN NOVEMBRO 1966 aperos nova libro de

IVO LAPENNA

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

(Suplemento al RETORIKO)

La Unua Parto konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1965 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

La Dua Parto enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

ĈIU leginto de RETORIKO, **ĈIU** persono, kiu iam aŭdis la aŭtoron paroli, certe havigos al si tiun ĉi libron, kies enhavo iusence signas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 15 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Eldono de la aŭtoro.

Proks. 150 pp., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita.

Vendoprezo post la publikigo: 11 Gld. aŭ 44 steloj; **por antaŭmendantoj ĝis la 15-a oktobro 1966:** 9 Gld. aŭ 36 steloj.

Utiligu la favoran prezon kaj mendu tuj de f-ino M. Vermaas, ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, sendante samtempe la sumon de 9,- gld. per poŝtmandato aŭ al pĉk n-ro 378964 je la nomo de UEA, kun preciza indiko pri la celo de la pago.

esperanto kaj ekspo 67 multe similas

Ambaŭ estas internaciaj.



Kiam ĝi komencas en Montrealo, Kanado la 28an de aprilo, 1967, Ekspo 67 estos la plej grava internacia ekspozicio iam konita. 70 landoj partoprenos en Ekspo 67. Ili konkuros en amika rivalado por montri al vi sian plej bonan en serio de grandegaj naciaj pavilonoj. Vi vidos iliajn vivoplenajn dancojn, aŭdos iliajn interesajn kantojn kaj lernos pli ol dumvivaj mondrondiroj povus montri al vi.

La temo de Ekspo 67 estas "La Homo kaj sia Mondo", la historio de la homa progreso, liaj aspiroj kaj lia estonteco. En mirlando de imagemaj elmontraĵoj, vi vidos la mirindaĵojn de la scienco, de la arto kaj de la industrio.

La elmontraĵoj, la vidaĵoj kaj la amuzadoj en Ekspo 67 multe superos viajn plej fantaziajn imagojn. Imagu, se vi povas, milionon da reflektataj lumoj, dancantaj sur la akvo, mil flagojn, artajn fajraĵojn, fontanojn kaj orkestrojn.

expo67 estos unikaĵo.

Planu nun viziti ĝin.

KANADA KORPORACIO POR
LA 1967 MONDEKSPOZICIO,
MONTREALO, KEBEKO, KANADO.
APRILO 28 - OKTOBRO 27, 1967.

© Copyright, 1963, by the Canadian Corporation for the 1967 World Exhibition